

Sennacieca REVUO

Longe akceptitaj eraroj sin trudas al ni, pro heredeco, kun sama evidenteco, kiel fizikaj veroj, kies niaj prapatroj daŭrege estis influataj.
Felix Le Dantec.

Organo de la
Tutmonda Laboristaro

Antaŭe
Esperantista Laboristo

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 150 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev; Cekoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol.
Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO: E. LANTY

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: L. GLODEAU

177, Rue de Bagnolet — PARIS XX (Francio)

Estu nenia miskompreno

Je sia ekvivo S. A. T. renkontis plejofte indiferecon kaj skeptikecon. Hodiaŭ ĝi havas sufiĉe da vivanteco por altiri la atenton de la indifereculoj kaj skeptikuloj. — Baldaŭ ĝi havos kontraŭulojn. Tio certe estas rezultato.

Ĉe la Asocitago de Germana Laborista Esperantista Asocio, akre oni diskutos pri S. A. T. Kaj en *Der Arbeiter-Esperantist* jam okazis polemikoj. Iel ajn mi ne volus enmiksiĝi la debatojn de niaj germanaj kamaradoj. Tamen mi opinias necesege diri, pli ĝuste, rediri, kiel rilatas S. A. T. al la naciaj organizaĵoj porvarbaj.

En Praha estis debatite pri statuto, kiu poste estis akceptita de la tuta anaro per ĝenerala voĉdonado. Tiel longe ĝis tiu statuto estos nia leĝo, naciaj asocioj ne povos eniri nian sennaciecan organizaĵon.

La tasko de S. A. T. estas praktike utiligi esp.on, ne okupiĝi pri porvarba propagando al esp.o. Ni konsideras, ke estas tutege malbona kaj kontraŭbatalinda la intenco intermiksi organisme du malsamajn taskojn. *Porvarba propagando estas loka afero. Utiligo de esp.o povas okazi nur per eksternacia, tutmonda laborado.*

Komprenoble ni tre deziras, ke ĉiuj anoj de »Glea« fariĝu ankaŭ anoj de S. A. T. Nenio malhelpas. *Unuope ili povas aniĝi.* Sed ni trovas vere stranga la postulo de kelkaj ĉefoj de »Glea«, kiuj volas, ke ĉiuj anoj aniĝu ope, kvazaŭ paradmarŝe. Tia pretendo estas absolute neakceptebla. Se tio okazus, la vivcelo de nia sennacieca organismo estus neniigata.

La iniciintoj de S. A. T. deziregas, ke oni eltiru ĉiujn konsekvencojn el la simpla fakto, ke la esp.istoj renversis inter si la lingvajn barojn.

Hodiaŭ la vorto »Internacio« estas kvazaŭ eluzita. Ligo de nacioj estas ankaŭ ia Internacio. La veraj internaciistoj baldaŭ bezonos alian esprimilon por reprezenti sian koncepton. Estu do la gloro de la esp.istoj liveri la bezonatan vorton: *Internaciismo fariĝu sennaciismo.*

La homaro pene paŝadas en la marĉoj el rutino kaj antaŭjuĝoj. Ti-kiuj deziras eliri el tiu situacio ne timu levi la kapon al la steleto brilanta en malproksimeco kaj montranta la idealon.

Ni esperas, ke en Düsseldorf troviĝos kamaradoj por firme kaj prudente prezenti kaj defendi la vidpunkton de S. A. T. Cetere, kia ajn estu la decido alprenota ĉe la Asocitago de G. L. E. A., ni ne timas pri nia kreskiĝanta Asocio tutmonda. Ĉi portas la estonton. Ĉiam hodiaŭo estis venkita de morgaŭo. Tial ke ni ne celas precipe al multanareco, sed al plena scipoveco de la lingvo kaj alta idealismo ĉe la »Satanoj«, ni ne bezonas fari nenan kompromison por altiri grandan kvanton da membroj.


Ŝafaro kiu blekante atendas, ke la paŝtisto konduku ĝin, ĉu al paŝtejo, ĉu al buĉejo ne reprezentas forton. Oni ne forgesu la grandan primilitan lecionon de 1914: La grandaj, multanaraj organizaĵoj el pseŭdo internaciistoj agis tute same kiel la plej puraj patriotoj.

S. A. T. gardu sin kontraŭ tia perspektivo. Ni de nun kutimiĝu kun persisto kaj kuraĝo al eksternacia, sennacieca sent-pens-kaj agad-kapablo.

E. LANTY.

Kio plej bone preparas solvon de la socialaj demandoj estas, ĉion konsiderante, la propra morala pliperfektigo; ĝi estas amo por aliuloj, kaj toleremo estas tiucele atentinda komenciĝo.

Jesuo estis kondamnata de pastroj kaj ekzekutata de soldatoj. Ĉiam pastraro kaj soldataro partoprenas en la grandaj historiaj okazaĵoj.



Mia kara E. LANTY.

Konfuzita mi estas pro tio ke, de post tiom da monatoj mi ŝuldas al vi ĉi-tiun leteron. Longe mi esperis skribi al vi alion ol la konfeson je kiu fine mi rezignas. Mi ŝatus laŭdi min pro definitiva esperantistiĝo. Ve! dek fojojn mi kredis scipovi la lingvon; dek fojojn ĝin mi forgesis. Sed eble, mia aventuro, simple rakontata, vekos ĉe kelkiuj utilajn pripensojn.

Ĉiufoje kiam mi povis dediĉi unu horon potage por lerni esperanton, mi sentis min, post unu semajno, en stato skribi per la helpa lingvo, ne nur al miaj amikoj, sed ankaŭ por malsevera publiko. Ĉiufoje kiam postulantaj okupoj senigis min, dum unu semajno, je la facila kaj ĝoja laboro, ĉio estis rekomencenda. Dumonatan persistadon, se mi ne eraras, estus sufiĉa por definitiva konkero. Sed en la densa arbaro el miaj laboroj kaj taskoj, ĉu mi povis videsperi tiel larĝan maldensejon? . . .

La malsukceseto de la tro okupata sesdekjarulo kia mi estas, konsilas, ŝajnas al mi, ke junaĝe oni lernu esperanton. Krom tio ke dum la juneco, la libertempoj estas pli longaj kaj la atakantaro de la okupegoj malpli granda kaj blekanta, la memoro tiam estas duoble opor-

(1) Eksciinte, ke Han Ryner lernas esp.on, multaj el niaj legantoj senpacience demandis: »Kiam do aperos originale verkitaĵoj de la eminenta lernanto?« Pasis la tempo; venis la dubo. La ĉi-apuda sincera konfeso montras al la senpacien-culoj, ke ili estis tro postulemaj.

Ni konsente komprenas la pravigajn motivojn de la famigonta aŭtoro de l'»Kvina Evangelio«. Ni estas tre dankaj al li pro lia merit-plena provo, kaj pro liaj kuraĝigaj vortoj. Se ni ne povas esperi Ryneran ĉefverkon legi en originala esp.o, ni devas tamen tre ĝoji, ke la aŭtoro de tiom da saĝ-kaj talentplenaj verkoj komprene legas nian lingvon kaj okaze uzas ĝin skribe.

Aldone mi ne forgesu sciigi pri la ekzisto de »Societo de Amikoj de Han Ryner« (Adreso de l'Prezidanto: S^{ro} Florian-Parmentier, 74, rue Vasco de Gama, Paris [XV]), societo kies celo estas konigi al la publiko la ampleksan verkaron de nobla homo, kiun nuntempe nur elita areto da personoj admiras kaj amas. Se en nia legantaro troviĝas franclingvanoj dezirantaj konatiĝi kun la Rynera saĝo ni tre konsilas al ili sin turni al la supra adreso. — Red.

tuna: facile penetrebla, fidela por konservi tion, kion al ĝi oni donas garde.

Estus tamen maljuste ŝenkuraĝigi niajn samtempulojn. Ĉiuj ekzistoj ne estas troplenecaj kiel la mia. Multaj senpene trovas la necesan tempon kaj kontinuecon. Malpli izolitaj ol mi, ili parolos en esperanto. Cetere raraj estas la individuoj tiom netaŭgaj kiel mi por la de mi provita eksperimento.

Oni scias, ke ni ne havas unikan memoron, sed multajn memorojn, diversaj kaj ne egale bonaj. Dum mia tuta vivo mi kulturis mian priidean memoron, malzorgis mian privortan memoron. Mi facile memoras serion da pensoj kaj iliaj flekseblaj kaj rigidaj koneksoj. Malfacile mi daŭre kunigas novan vorton, ĉu kun la objekto kiun ĝi signas, ĉu kun la vorto kiu en mia lingvo ĝin signas. Mi akiris bonan memoron de filozofo kaj de oratoro. Mi lasis malfortiĝi, preskaŭ neniĝi en mi tion, kion mi nomos poliglota memoron. Eĉ ĉi-tie estus necese distingi. De la lingvoj, kiujn mi lernis, mi rekonas la vortojn legante; ilin mi ne retrovas por skribi. Mi estus eble lertulo por traduki francen; certe mi estus mallertulo por traduki el la franca alilingven. Sur tiu kampo mi faris gravajn perdojn, ne nur pro malzorgemo, sed pro ia aktiva komplikeco de mia volo. Dum mia juneco mi skribis latine, provence kaj itale. Formalaperintaj kapabloj. La kaŭzo estas, ke de post longa tempo, mi diligente penas fariĝi artisto je franca lingvo, kaj, prave malprave, mi opinias, ke plej bone sukcesas la muzikisto, kiu ĉiam ludas per la sama instrumento. Diligentante verki en esperanto, mi malplenumis iun el la larĝaj antaŭdecidoj de mia vivo kaj mia subkonscio (duonkonscio) malhelpis, mi kredas, mian konscian penson, malgrandigante tiel terure ties povon.

Mi do rezignas, kara amiko. resti malverkema esperantisto, kiu legas kun ĝojo, sed ne sukcesas skribi, krom nur dum subitaj kaj mallongaj intermitoj.

Povu mia ekzemplo kuraĝigi la junulojn, kaj tiujn, kiuj havas libertempojn, kaj tiujn, kiuj ne devas venki la samajn obstaklojn kiel mi. Ti-kiuj havas morgaŭon antaŭ si rapidu akiri la organon, kiu morgaŭ estos necesa por ĉiuj.

Kaj mia mezbona kelkdimanĉa esperanto, kiel mia ĉiutaga franclingvo, utilu al mi por diri, mia kara Lanty, tutan mian simpatian por via persono kaj por via fratiga verko.

Han Ryner.

Por la malsatanta rusa popolo

4a listo de monoferantoj

La Satanoj de Barcelono: 46,30 fr. fr. — Grupo de Frankfurt a. M.: 140 mk. G. — K^{do} KELLER (Breslau): 8 mk. G. — K^{do} M. HERRMANN (Looz, Polio): 200 mk. P. kun la antaŭaj listoj = fr. fr. 271,30, mk. G. 314, mk. P. 200.

Instruo per laboro⁽¹⁾

Originalaĵo de Arthur Degen

Niaj lernejoj, almenaŭ en Germanujo, estas filinoj — nun maturiĝintaj filinoj — de la eklezio, kiu fondis en la monaĥejoj lernejojn parte por estontaj ekleziuloj, parte por la filoj de la nobelaro. Tie oni traktis religiajn, historiajn, lingvajn kaj matematiko-astronomiajn sciojn, do pure spiritajn, ne apartenantajn al la palpebla mondo. Jen la konvena metodo: Ĝa instruisto scias la materialon aŭ de sia instruinto, aŭ el verkoj. Li prelegas — do transliveras — ĝin kun la sama aŭtoritato kiel lia instruinto; kaj la lernantoj aŭdas, notas, memorigas — do reĉetas — ĝin kun la sama konfido kiel antaŭe li mem. Kiam en la mezepoko la riĉaj komercuroj kaj eĉ la princoj ekfondis lernejojn, ili akceptis kun la instruontoj ankaŭ la planon, almenaŭ la metodon de la monaĥejoj lernejoj. Johann Wolfgang Goethe karakterizas tiun ĉi aŭtoritatan kaj receptigan metodon per sceneto en sia mezepoka kavalirdramo: *Götz von Berlichingen*. Tute fiere la knabo de la heroo la rezulton de l'jus pasinta leciono resumas jene: "Jaxthansen estas kastelo kaj urbo sur la Jaxt kaj apartenas kiel heredaĵo kaj posedado al la kavaliro de Berlichingen". Kaj demandite de sia patro li ne scias, ke li mem vivas en la citita kastelo, eĉ ne, ke la citita kavaliro estas lia patro. Tiu sceneto klare evidentigas, ke tiu ĉi metodo — eble tolerebla ĉe pure spiritaj fakoj — fariĝas farso aplikate en realaj instrufakoj kaj kaŭzas suprajn babilemon pri nekonitaĵoj. Ju pli la instruo ampleksis realaĵojn, des pli rimarkiĝis tiu netaŭgeco, plej klare en la elementaj lernejoj.

Komence kiel *Winkelschule* (angula lernejo, tiel nomita, ĉar la metiisto-instruisto instruis en sia metio — kaj loĝ — ĉambro) ĝi nur traktis skribadon, kalkuladon kaj legadon kaj memoriĝadon el la biblio, sed poste ĝi konscie imitis la superan, "latinan" lernejon rilate al enciklopedieco kaj universaleco de la plano kaj sekve de tio ankaŭ rilate al la jam priskribita metodo, do ĝi reprezentis tiu kiel nuran "parkergejon".

Ekstaris famaj pedagogoj, kiuj rimarkinte tion, klopodis pri ŝanĝo. Laŭ la diroj de Baco de Verulam, † 1639: "Estas gravege, ke ni la okulojn de la spirito neniam deturnas de la objektoj mem" kaj de John Locke, † 1704: "Nenio estas en la spirito, kiu ne antaŭe estis en la sentoj". "La sentoj estas la pordo de la animo". Comenius, la filantropoj Rochow kaj fine Pestalozzi enkondukis la ideon de la intuo en la pedagogian mondon kaj tiom ŝatis ĝin, ke ili aplikis ĝin eĉ je netaŭga kaj neinda objektoj. (Dum ekzameno en la "Dessau-a Philanthropinum" 1776, Wolke instruis pri homnaskiĝo antaŭ plej detaliga bildo kaj postulis, ke la infanoj ĉestu la naskiĝon de siaj gefratoj, por ke ili dankemiĝu eksciinte la dolorojn de la patrino. Pestalozzi ekzercis la intuo-kapablon eĉ je truo en la tapeto). Hodiaŭ certe neniu plu kontraŭstaras la ideon de la instruo per intuo, kiu tamen bezonis du jarcentojn por ĝenerala aprobiĝo.

Tiu ĉiusenta kaj ĉiuflanka perceptado pri iu reala objekto certe bonefikis, sed ĝi tre ofte streĉis la fortojn nur de unu lernanto, lasante al la aliaj la nuran aŭdadon. Pro tio oni daŭrigis la serĉadon al iu metodo ĉiujn lernantojn samtempe kaptanta kaj laboriganta.

Kiom longe ankoraŭ tiu ĉi ideo de la instruo per laboro atendos sian efektiviĝon? Ĝi ja nepre ne estas malpli aĝa, eĉ

(1) Ni enmetis ĉi-tiun artikolon, ne nur por konigi rimarkindan studaĵon, sed ankaŭ kun la espero, ke troviĝos kioj por kompletige aldoni informojn pri tiu temo. Precipe valoraj estus raportoj, tute objektivaj prilaborataj, pri eksperimentoj jam faritaj aŭ nun farataj en publikaj aŭ privataj lernejoj. Plie ni estas certaj, ke multaj fakgazetoj volonte enpresus tradukon el tiu artikolo. Jen bona okazo por propagandi nian lingvon — kaj samtempe konigi nian revuon — Red.

naskiĝis en la samaj cerboj kiel la supre menciita. Ekzemple Amos Comenius, † 1670, argumentas jene por la manlaboro: "La homa korpo bezonas moviĝon kaj okupiĝon. La manlaboro kontentigas tiujn bezonojn, kaj krom tio ĝi estas necesa, por ĝustamaniere prepari al la vivo. La malgrandaj infanoj konatiĝu kun la ĉefaj metioj, por kleriĝi pri la vivo kaj por ebligi, ke montriĝu la inklino al iu ajn profesio". "Al la sciebla oni aldonu la fareblan!" "Ĉio lernota estu lernata per agado!" "Krom sentoj, intelekto kaj koro ankaŭ la mano ĉiel estu iom post iom pli kulturata!"

John Locke postulis de sia nobela edukato, ke li ellernu metion, eĉ du aŭ tri, sed nepre unu fundamente. Li diras: "La infanoj konstruu mem siajn ludilojn, por ke ili kontentigu siajn bezonojn per streĉo de propraj fortoj. Tiamaniere ili lernas dezirmoderemon, atenton, diligentecon, pripensemon, eltrovemon kaj ekonomion — do ecojn kiuj utilos al la plenkreskinto, kaj pro tio povas esti nek lernataj tro frue nek fundamentataj tro profunde."

Jean-Jacques Rousseau, † 1778, skribas en sia "Émile": "Nepre mi postulas, ke Emilo ellernu metion." "La aparatojn por la fizika instruo devas konstrui Emilo mem, ĉar estas nerefuteble, ke oni tiamaniere akiras pli klarajn difinaĵojn, ol per receptiga instruo, kaj ne al kutimiĝas, malbrave kaj sklave subigi sian intelekton sub iu aŭtoritato". La laboro do estas rimedo, por vekti kaj evoluigi spiritajn fortojn.

La filantropoj kaj pietistoj enkondukis la laboron en la instruplanon pli akcentante ĝian moraligan valoron. Ekzemple Salzmann, † 1811, en sia "Ameisenbüchlein" refutas la kontraŭdirojn jene: "La plejmulto ja pro tio kontraŭstaras, ĉar nur la malplejmulto de sinjoroj, la pedagogoj, mem lernis manlaboron kaj tial kondamnas kaj absurdigas tiun ĉi metodon."

La vicon finu nia majstro mem, Johann Heinrich Pestalozzi, † 1827, la apostolo de la intua ideo, la pioniro de la instruo per laboro. Li envicigis la laboron en la eduko-instruplanon de Neuhoŭ, Burgdorf, Stauz kaj Münchenbuchsee. Rigardu la lastajn paĝojn de "Lienhard kaj Gertrud", kaj vi legos, kiel la nova instruisto de la vilaĝo, por lerni vizitante Gertrud-on, kun admiro vidas, kiel la infanoj laŭ la modelo kaj sub la okuloj de la patrino movas la manojn ĉe la ŝpinilo kaj en la ĝardeno. "Tagon post tago pli klariĝis, ke la laboremo, la fizika agado estas la vera, sankta kaj eterna rimedo, kunigi ĉiujn homajn fortojn je unu sola komuna forto, la humaneco. Ĉiutage li pli klare vidis, kiel la laboremo evoluigas la intelekton, fortigas la korsentojn, malhelpas la vagadon de la voluptemo mortigan por fortoj kaj moralo de l'vivo, fermas por la imagemo la pordon al ĝia labirinto, malakrigas de la vantaj langoj la pinton de ilia babilemo, gardas nian devosenton kontraŭ pereigi kaj rekondukas de la eraro, rigardi priparaladon pri faro kiel la faron mem, nian babiladon pri heroeco kiel herocon mem kaj nian senvaloran revadon pri kredo kaj amo kiel tiujn diajn kapablojn mem. Tiu pli alta opinio pri la homa eduko kaŭzis, ke torna kaj rabota stabloj, kusenoj por puntfarado kaj kudrado k. t. p. trovis lokon en lia lernejo.

El la verko: "Kiel Gertrud instruas siajn infanojn ni citu: "Nur per evoluo de la fizikaj lertoj la homo atingas internan kontenton". "Eduko al laboro estas pli grava por la popolo ol konduko al scioj." "Por povi, ĉiukaze vi devas fari; por scii, ofte sufiĉas, ke vi kondutas pasive, kelkfoje vi nur bezonas vidi kaj aŭdi." "La manlaboro estas fundamento por kaj konduko al moraleco. Sen manlaboro harmonia eduko — homeduko — ne estas ebla."

En gazeta artikolo li skribas: "La homo serĉu sian ĉefinstruon ĉe sia ĉeflaboro kaj ne anticipu la senkzemplan instruon antaŭ la laboro de siaj manoj. Li mem eltrovu sian instruon precipe

el sia laboro kaj ne elmeditu la laboron el la teorio. Pro tio la instruo de infano koncernu ties efektivan laboron kaj estu limigita per cirklo ĉirkaŭ ĝi, por ke nek infano nek instruisto facile povu forvagi. Kara leganto, la amason da malsaĝuloj en la mondo certe ni ŝuldas al la sensecaĵo, laŭ kiu ni la junaĝon de niaj infanoj deturnas de la laboro kaj kondukas al la libroj.“

La eminentuloj de la societo, scienco kaj pedagogio el la tuta mondo vizitis Pestalozzi-n, ĉiuj aprobis eĉ admiris, hejme ili rekomendis kaj postulis lian metodon. — Sed ankoraŭ komence de la dudeka jarcento la malgrandaj elementuloj komencis dum la unua lerntago, legadon kaj skribadon. La leĝo de la inerteco, la potenco de la kutimo, la tradicio malhelpis la aprobon kaj enkondukon de la nova metodo. La profesiuloj mem estis la plej fervoraj kontraŭuloj. En la supera lernejo regis la material-plano, kaj la popollernejo imitis ĝin nekonsiderante kapablon kaj inklinojn de la infanoj. Jes, estas vere, ke, celante la revivigon de la hejmlaboro, la dana oficiro Klansen-Kaas fondis lernejon pliakcentantan la metian perfektigon. Sed la pedagogaro de Grube ĝis Lauckhard faris ĝin “ellerno de metioj”, “instruo pri panperlaboro”, kaj nun oni certe ne ekmiras, ke la tuta metiistaro pro timo je perdo de klientoj laŭte kontraŭkriis. La mizerego de la mondmilito kaj de la Versailles-a paco ja ŝajne — sed nur ŝajne — pravigas ilin, instigante la germanojn, mem fari siajn ŝuojn, ripari ilin kaj surnajli plandojn. Sed tio certe ne daŭros. Tio ja neniam estis celo nek de la social-ekonomiistoj, nek de la klasikaj pedagogoj, nek ankaŭ de nia Friedrich Schiller, malgraŭ li dirigas sian Wilhelm Tell: “La hakilo en la domo evitigas la ĉarpentiston” aŭ al la malgranda filo: “Brava pafisto mem helpas sin“.

Tamen la pedagogoj de la pasinta jarcento akuzas ne nur la danan eksperimenton, sed la tutan ideon jene: “Tiu nova instruo prokrastas la labordividon kaj repasigas la kulturon.” Ĝi anticipas la lernadon en la majstra metiejo, trosatigas la infanon kaj kaŭzas malintereson dum la leciono. “Ĝi metas la infanon en danĝeron de ekspluato per profiteblaj spekulantoj.” “Ĝi evoluigas produktemon kaj profiteblon en la infanoj mem kaj difektas la moralecon.” Tiu necerta eksperimento pro tiu dubinda ŝanco ne meritas, esti akceptata kiel laŭdeva fako. La lernejo ankaŭ ne rajtas devigi la lernantojn al la manlaboro, ĉar tiu destino estas gepatra rajto. Kaj la gepatra eduko mem zorgu — kaj en orda domo ankaŭ jam zorgas — pri okupo de la infanoj. « Sufiĉu! Ili tute malkomprenis aŭ volis malkompreni Pestalozzi-n kaj lian grandan ideon, malgraŭ ili cedis la enkondukon de virinaj laboroj, de trikado, flikado kaj brodado. Sed oni ja al kutimiĝis al strangaj decidoj de la tiuepoka pedagogaro, kiu ekzemple, malgraŭ aklamante ĝin por knaboj, tute malaprobis la gimnastikadon por knabinoj.

Nur unu el la disciplaro de Pestalozzi sin plene liberigis de tiuj prokrastaj potencoj. Li ja plugis novan kampon, Friedrich Fröbel, † 1852, la fondinto de la «infanĝardeno» (pedagogia infanĝardejo por la antaŭlerneja aĝo) kaj unua instruisto de infanĝuvernistinoj. Li diras en sia «Menschenerziehung» (arto de homaj eduko kaj instruo): «Ekzerco de la sentoj estas ekzerco de la intelekto, tion la pedagogio scias jam de longe, sed ĝi ĉiam ignoris, ke ekzerco de ĉiuj esprimorganoj nepre ne povas esti alia ol spirita klerigo. Por esprimi la en spirito naskiĝintan la homo posedas tri rimedojn: vorton, mienon kaj faron. Per intuado li akiras sciojn, per esprimado li akiras lertecon. Sur la unua ŝtupo, kiel suĉulo, la homo ankaŭ spirite ensuĉas, sur la dua, kiel infano, li propravole esprimas dum ludado.» «Lertigo de ĉiuj membroj kaj organoj estas la ĉefa celo de la infanzorgado en la gepatra domo. Gepatroj aŭ edukantoj nepre devas kontentigi kaj konduki la agemon de siaj infanoj, por ke ties interna vivo

ekstere sin montru, prezentu kaj formu.» «Sur la tria ŝtupo, por la geknaboj komenciĝas la instruo.» «Ĉiu prilaboru propran ĝardeneton. Ankaŭ ludejon kun sabloamaso havu ĉiu lernejo.» «Vintre la gelernantoj sin okupu per mekanikaj laboroj kun koloraj paperoj, kartono, lignetoj, vaksargilo k. t. pl.»

Ne malhelpite de iu ajn tradicio la infanĝardeno nun ekfloris pro sia laŭnatura, laŭinfana Fröbel-metodo, precipe en nia urbo Leipzig, kie Henriette Goldtschmidt antaŭ kvindek jaroj, fondis modelan infanĝardenon kun seminario por guvernistinoj, kie al la sama celo laboris Angelika Hartmann, kie fine la urbo mem en sia virinprofesia lernejo aranĝis fakon por guvernistinoj kaj en ĉiu popollernejo publikan infanĝardenon. Sed ĝis la komenco de la nuna jarcento la lernejo, tiel la supera kiel ankaŭ la popola, ne ŝatis tuŝiĝi kun tiaj infanaĵoj kaj ludaĉo. Kaj la nuna rilate al rigideco vere restis la supera, malgraŭ ke eĉ la universitato per praktikado kaj seminarioj laboroj nun pli volonte cedas al la novaj metodaj ideoj.

Jen nova pioniro ekstaris en la (unue neprofesia!) pedagogio nuna universitata docento Robert Seidel en Zürich. Incitite de la fama germana socialisto Karl Marx, kiu skribis: “En la estonta eduko oni kunigos laboron kun gimnastiko kaj instruo, ĉar tio estas la sola metodo por eduki ĉiurilate evoluintajn homojn kaj ankaŭ rimedo, por pliiĝi la socian produktadon.” Li 1885 eldonis libron titolitan “Arbeitsunterricht” (Instruo per laboro). Tie oni legas: “Homo ne nur estas anima, sed ankaŭ korpa estaĵo, li estas ne nur sentanta, perceptanta, pensanta kreaĵo, sed pli altgrade volanta, aganta, kreanta persono. Precipe en la infano evidentiĝas tiu-ĉi naturo.” “La infano havas naturan instinkton al moviĝado, sed en la lernejo (ĝisnuna!) oni devigas ĝin, dum horoj senmove sidi sur la sama loko. Nia hodiaŭa sciiga kaj lerniga instruo prizorgas precipe la spirite pasivan flankon de la homa naturo kaj malkonsideras la volantan, agantan kaj kreantan — do la aktivan. Tiamaniere ĝi malatentas, eĉ pereigas multajn valorajn praktikajn, teknikajn kaj artajn talentojn kaj kapablojn. Ĝi fremdigas la infanojn rilate al la praktika vivo, anstataŭ prepari ilin por ĝi.” “La moderna stato baziĝas sur laboro, do la laboro devas esti la fundamento ankaŭ de la eduko kaj klerigo. Resume: La instruo per laboro estas sociala, politika kaj pedagogia necesajo, ĝi estu la ĉefa principo en la lernejo, unue ĉar ĝi estas riĉa fonto de konoj kaj forta rimedo al ili, kaj due ĉar ĝi estas ankaŭ la plej taŭga edukometodo.“

Tiu libro ekblovigis ventegon en la pedagogia mondo kaj trans ties limoj. En la nord-eŭropaj ŝtatoj kaj en la sentradicia Usono la ideo de la instruo per laboro rapide progresis. En Francujo, kie la ministro por instruaferoj solene deklaris: “Ni volas nobligi la manlaboron kaj elektas pro tio la plej taŭgan, sole praktikan rimedon, ni enkondukas ĝin en la lernejon,” mankis mono kaj prepariĝintaj instruistoj. En Germanujo tie kaj tie ĉi ekstaris amiko de la nova instruo, fondiĝis unuigoj de amikoj. En keloj kaj aliaj ne tro multekostaj lokoj oni instalas manlaborejojn por knaboj. Fine kelkaj urboj enkondukis la manlaboron en la publikan lernejon, kiel antaŭ ĉiuj en grandioza maniero Kerschensteiner en München. En Leipzig oni fondis manlaboran seminarion por instruistoj kun tri fakoj: por kartono —, ligno — kaj metal-laboro, kiu dank’ al la senlaca klopodo de la kortega konsilanto Hildebrand (iama simpla popolinstruisto) kreskis kaj floris, kaj hodiaŭ ne povas akcepti eĉ la duonon de la aspirantoj, Ni tute ne ignoras la utilon de tiu-ĉi movado, almenaŭ ne la manlertigon de granda nombro da instruistoj. Sed ankaŭ tiuj amikaj pioniroj miskomprenis Pestalozzi-n, Seidelon kaj la tutan ideon, ĉar ili la manlaboron ĉevicigis kiel instrufakon, anstataŭ starigi ĝin kiel instruprincipon.

Fine ni nun iru, danke menciante Wetekamp-Charlottenburg kaj la solecan kantonon de la unua radiumbanloko Brambach, al

la Leipzig-anoj, kiuj ne nur akceptis la Seidel-ajn ideojn pri instruado per manlaboro, sed plue evoluigis ilin al instruado per laboro en plej ĝenerala senco.

Ne estas hazardo, ke la Leipzig instruistaro ankaŭ sur tiu vojo marŝas ĉe la pinto. Ĉiam ĝi estis unu el la plej modernaj en tuta Germanujo. Tion multfoje atestas la emitentuloj de scienco kaj pedagogio, tion ankaŭ pruvas la Leipzig-a pedagogia ĵurnalaro, ĉiu paĝo de la ĉiusemajna fakgazeto kaj amaso da verkoj. Ĝi ĝuis la ne troiĝeblan preferon, aŭskulti kiel samurbanon la universitatan fondinton de la eksperimenta psikologio. La Leipzig-a instruista unuiĝo oferante pli ol centmil (antaŭmilitajn) markojn, fondis sub lia egido la unuan instituton por infansikologio, kiu, direktata de Dro. Brahn, Rudolf Schulze (konata pro sia informvojaĝo tra la nordeŭropaj ŝtatoj) kaj Johannes Schlag, eldonis aron da verkoj, honore akceptitaj de la serioza sciencularo kaj tradukitaj en diversajn lingvojn. La eksperimento trastrekas kelkan tradiciaĵon, do oni facile povas konkludi, ke la potenco de la heredita ne estas tro granda en la Leipzig-a instruistaro.

En la unuaj jaroj de nia jarcento junaj instruistoj kuniĝis, por ŝanĝi la kontraŭnaturajn planojn kaj metodojn de la instruado per la malgrandaj elementuloj, ili pli kaj pli prokrastis la komencon de legado, skribado kaj kalkulado, kaj plenigis la unuajn semajnojn — poste duonjarojn — per ludado en la ĝardeno kaj ĉe la sabloamaso, per kolorkrajona skizado, per tondado de koloraj paperoj, per metado de lignoŝtipetoj, lentoj, kartonrondaĵoj k. t. p. fine eĉ per plastilina (vaksargila) modelado, feliĉe evitante la stereometriajn korpojn de Fröbel kaj preferante la realaĵojn de la nin ĉirkaŭanta vivo.

Vere tiu okupo respondis al la infana naturo kaj klarigis, kiom ofte oni erare prijuĝis la malgrandulojn. Silentemaj infanoj, ne instigeblaj eĉ al unu vorto surprizis per aliaj esprimmanieroj montrante multajn kaj klarajn sciojn. Baldaŭ la infanoj ankaŭ serioze laboris zorgante pri propra aŭ tutglata ĝardeneto, el blua papero tranĉante, aŭ el plastilino formante sian por propra legado necesan plej simplan "antikvo" literaron, fine kun — aŭ nemetante ĝin kiel veraj kompostistoj. Dum la tuta somero ofte la gepatroj petis, nun komenci la lernadon, "ĉar aliaj (samaĝaj) infanoj jam legas kaj skribas", kelkaj pro la neplenumo de sia peto eĉ ĉagreniĝis — tamen fine, je pasko, ĉiuj estis surprizitaj — agrable surprizitaj — ĉar ĉiuj infanoj nun ankaŭ, kaj pli bone povis legi kaj skribi.

Gvidata de la instruistoj Springer (Wedekampano), Vogel, Erler kaj Kögber 1908 la instruista unuiĝo akceptis jenajn tezojn: La elementa instruado estas libera laŭ materialo, plano kaj metodo. Ĝi estas neapartigata en fakojn. Legado kaj skribado ne estas envicigataj en la planon de la unua jaro, kalkulado nur kiel agado kun moveblaj aĵoj. La elementa instruado labore okupas la infanojn. Parolado kaj modelado estas samvaloraj esprimrimedoj. Dum la unua jaro la instruado ampleksas nur dekdu horojn posemajne. La instruistaro kondukas sian klason tri jarojn kaj garantias atingon de la ordinara lerncelo nur post la tria jaro. La instruista unuiĝo eldonis fiblon (unuan legolibreton): "Guck in die Welt!" (Rigardu en la mondon!) en simpla antikvoalfabeto, kaj la junaj instruistoj estis pretaj, komenci la provon laŭ ĉi tiuj tezoj.

Sed ekstaris ankaŭ kontraŭuloj, precipe inter la direktoroj de la popollernejoj, kies konferenco la magistrato rigardis kiel la solan fakularon. Per eĉ ĉiu rimedo ili malhelpis ĉiun liberigon de plano kaj aŭtoritato. — Ĉu ili timis pri siaj nur sur ekstera aŭtoritato bazitaj postenoj? Ili cedigis instruistojn kaj gepatrojn, kiuj jam estis anoncintaj sian partoprenon, tiel ke ofte nur ne tro inteligentaj infanoj restis por la provo. Kaj ofte mankis bonvolo, eĉ objektiveco dum prilaboro de enketoj pri la sukceso de la novaj instruado kaj fiblo. Tial la afero ne kontentige estis

prosperinta, kiam la milito forŝiris la junajn progresemajn instruistojn. Sed nun la paco rekondukis multajn, kaj la revolucio forigis ĉiun nur eksteran aŭtoritaton kaj liberigis la vojon ankaŭ por nia ideo, kiu nun trovis sian provizoran solvon en la granda verko de la supre citita instruisto Kögber (unua distrikta inspektoro en Gotha): "Freier Elementarunterricht". (Libera elementa instruado.)

Sed ne nur la elementan instruon koncernis la nova ideo. Dum (ĉiujara) oficiala konferenco de la tuta Leipzig-a instruistaro (eble 1910) oni prezentis fizikan lecionon. Antaŭ ordinaraĵoj lernejaĵoj tabloj sidis po du knaboj kiuj kune laboris. Ili prenis el kestoj (je ambaŭ flankoj de la tablo) stableton, levilon, diskon, rutilojn, breton, ŝnuron, plumbobulojn, resume ĉiujn elementajn ilojn, kiujn ili antaŭe mem estis farintaj. Nun ili el tiuj elementoj konstruis levilojn unu — kaj du egal — kaj diversbrakajn, pesilon, rutilaron, deklivan, ebenaĵon k. t. p. kaj mem eltrovis el ili la fizikajn leĝojn de ekvilibro k. t. p. Tiuokaze montriĝis, ke la Leipzig-a instruistaro nepre ne malpli ŝatis kaj celis tiun ĉi lastan, spiritan laboron, ol la manlaboran preparon de la ilaro.

Tie ĉi ni ne evitu, citi la seminarian profesoron Dr^o Frey, kiu enkondukis en sian laborinstruon la prilaboron de drato kaj ondkartono kaj kiel direktoro de la lerneja muzeo entute akcelis la movadon. Kun danko ni diru la nomon de lia kolego, profesoro Kühnel, kiu kreis novan kalkulmetodon laŭ la postuloj de nia ideo. Ni ankaŭ ne forgesu Lindemann kaj Stiehler, kiuj la desegnadon kaj modeladon majstre adaptis al la nova lernejo kaj en sia fako kapabligis multajn junajn instruistojn, ĝuste apliki la novan metodon.

Merititan admiron kaj aprobon akiris ankaŭ granda ekspozicio en la urba foirpalaco "Kaufhaus", kiu montris produktaĵojn de la ses — ĝis dek — kvarjara ĝelernantaro. Apud plastilinaĵoj ĝardenoj kaj metiejoj kun ĉia ilaro, apud modelitaj fabeloj oni trovis landkartojn eĉ reliefaĵojn, modelojn de minejoj, maŝinoj, aŭtomobiloj, ŝipoj, aerostatoj kaj aviadiloj, eĉ multajn uzeblajn aparatojn. Bedaŭrinde — pro la neplena konvinkoforto — la pliaĝaj estis laborintaj ne dum la instruado, sed hejme dum liberaj horoj.

Ke la Leipzig-a instruistaro ne kontentigis per la nura manlaboro, oni eksciis el la alia temo de la jam dirita konferenco. Estis kateleciono, kiu montris, ke la infanoj per propra klopodo lernis melodion, eĉ trivoĉan kanton. Unue ili montris la necesajn supozojn por tiu povo: ili legis notojn, klarigis signojn, takton k. t. p., fine ili trafis sonojn de ĉiu interspacio. Tiuj kapabloj estis rezulto de multhora laboro, sed vere ebligis al ĉiu infano, senhelpe havigi al si la scipovon de ĉiu ajn kanto. Oni malaprobis la helpon de la violono, ĉar ĝi tro facile fariĝas lulilo de pasiveco kaj mortigilo de la infana aktiveco. Sciis, en tio la Leipzig-anoj entute trovas la esencon de la instruado per laboro: La infano ne pasive receptu, sed aktive akiru per propra laboro; ĉu de la mano, ĉu de la spirito. Pri tio ankaŭ legu la 1909 de la instruista unuiĝo eldonitan libron. „Die Arbeitsschule“ (Laborinstruo). Precipe profesoro Dr^o Hugo Gaudig, la direktoro de la ĉi-tiea instruistina seminario zorgis, ke la manlaboro ne tro akcentiĝu kaj ne perfortu la spiritan. Tial la Leipzig-a instruistaro ja ankaŭ diras pri laborinstruo dum etika aŭ germanlingva, eĉ fremdlingva leciono. En tiu rilato legu Paul Georg Munch, en tiu-ĉi rigardu la trivoluman kolekton: "Im Strome des Lebens". (En la rivero de la vivo.)

Tie ĉi volonte mi ankaŭ mencias saksan instruiston, kiu laŭ nia principo traktas geografion pri fremdaj landoj, klarigante la multnombrajn interesajn sendaĵojn, kiujn la poŝto el tuta la mondo ekspedis al liaj korespondantaj Esperanto-lernantoj.

Kiu estas la unua stato? Ni citu nur la ĉefajojn. La elementa instruado estas tute libera — bedaŭrinde mankas mono por la plej taŭga instruilo, la plastilino. Ĉiu ofice anoncata provo estas permesata. La eluzo de ĉiu okazo por manlaboroj estas

rekomendata. Ĉiuloke la hejmgregiona laboro estas akcentata kaj la traktado de fremdajoj en historio, geografio kaj zoologio parte forigata, parte transŝovita al pli aĝaj klasoj. La naturscienca instruado en la superaj klasoj (fiziko, kemio kaj antropologio) estas priskribo de la homaj vivo kaj laboro. De la tria ĝis la oka jaro ĉiu klaso havas kvar (ĉiu duonklaso du) horojn por manlaboro. En ĉiu lernejo oni instalas laborejon por kartonlaboroj, en multaj ankaŭ por ligno, en kelkaj eĉ por metallaboroj. En ĉiu lernejo estas kelkaj — provizore sufiĉaj — instruistoj, kapablaj por manlabora instruado — feliĉa sekvo de la jam delonge aranĝita t. n. "Knabenhort" (pedagogie direktata, luda aŭ labora — precipe manlabora — okupo de malriĉaj infanoj dum liberaj posttagmezoj en apartaj ejoj aŭ en la ĝardenoj de la popollernejoj) — multaj preparas sin en la komence citita manlabora seminario aŭ en malgrandaj laborsocietoj eĉ ĉiu lernejo. Por virinaj laboroj oni jam delonge estas zorginta. Ekzistas en ĉiu lernejo eĉ du laborejoj por trikado, flikado kaj brodado kaj en ĉiu urba distrikto boninstalitaj kuirejoj. La instruado estas en manoj de zorge preparigintaj fakinstruistinoj, kiuj gajnas preskaŭ la saman salajron kiel la ĝenerala instruistaro.

Restas fine raportoj ankoraŭ pri la ĉi tiea provolernejo por knaboj, ĵus instalita en plej nova, moderna konstruaĵo, por akiri necesajn spertojn pri praktikado de la nova ideo en ĉiu fako, por ĉiu aĝo. Sub la estreco de la jam ofte citita instruisto Vogel tie laboras ankaŭ sinjoro Erler, kaj mi ne volas fini nesciiginte kelkan pri lia ĝisnuna laborinstruo. Estas klaso de dekdu — ĝis dektrijaraj knaboj. En la ĉambro vi ne trovas la ordinarajn benkojn kaj tablojn adaptatajn por senmovigi la infanojn, sed horizontalajn fortikajn tablegojn, pli ol tri metrojn longajn kaj unu metron larĝajn, kun kestoj por la ĉefa ilaro. Ĉirkaŭ ĉiu tablo sidas sur ordinaraj seĝoj ok, eĉ ĉiu pinto kvar knaboj kiel laborsocieto. Ĉe la muro staras ankaŭ ĉiumetiaj stabloj kun gasforno, gluila pota kaj la necesa ilaro. Tiu ĉi supre citita kvarkapa laborsocieto estas nedividebla unuiĝo, inter si solvanta ĉiun problemon, plenumanta ĉiun taskon, kune faranta ĉiun laboron. La lernantoj demandas, la instruisto respondas aŭ montras. Kara leganto, certe vi interrompos: "Ho, kia malpurigo de la aero, de la planko, kia nervoziga bruoj!" Jes, sed unue: en la nova provolernejo oni certe zorgos pri higienaj instalaĵoj, kaj due: laborinstruo ja ne estas ekzerco al silentemo. Ĝenanta kriado ne necesas kaj ankaŭ ĝis nun ne okazis. Kaj vian trian plej severan refuton, ke ĉi tiuj laborsocietoj estas kasejoj por maldiligentuloj, Erler mem kontraŭdiras jene: "La instruisto devas nur protekti la malfortulojn kontraŭ la pretendemaj fortuloj. Instigo al diligenteco ĝis nun ne necesis." Apenaŭ estas aldoninde, ke la instruado ofte okazas sur kampo, en ĝardeno kaj arbaro, en metiejo kaj fabrikejo. Per tiu divido en laborsocietojn kaj per la tuta instrumaniero Erler celas kaj atingas ankaŭ edukon, precipe al socia moraleco. Ĉiu eraro, ĉiu manko trafas la socion, ĉiu bona penso, ĉiu klopodo, ĉiu singardo helpas al ĝi. Ĉar ne ekzistas ĉiuj iloj por ĉiu lernanto eĉ por ĉiu societo, kelkfoje okazas, ke unu devas atendi la finlaboron de alia. Do, por ke la atendado ne tro daŭru: "Antaŭen, mi helpas vin!" Fine ni citu la naskiĝintan estimon al la manlaboro kaj per tio ankaŭ al la tuta laboristaro kaj al la malsupraj popolklasoj entute.

Daŭrigante tiun penson ni nepre ne forgesu, ke en tiuj lernejoj oni ankaŭ instalas instituton por esploro de profesioj kaj konsultojn por konsili geknabojn kaj gepatrojn pri la lernota profesio, kiuj ambaŭ firme interrilatiĝos kun la jam supre citita psikologia instituto de la Leipzig-a instruistaro.

Tia la unua — certe ne la fina stato —. Sed ni esperu, ke per libera provo la mondo akiros lernejojn, super kies pordon oni prave skribos la devizon: El la vivo — por la vivo.

El "LA VENDREDA KLUBO"

(Libro recenzita en nia aŭgusta no)

Eldonita de la firmao Hirt & Sohn, Leipzig

La japana militarismo en Vladivostok

Marde, 14. junio, en Pervaja Reĉka⁽¹⁾, proksime de la muelejo de Rusa kriminal-esplora fako, kune kun japanoj estis aranĝita ĉirkaŭperseĝo; oni serĉis kulpulojn de l' mortigo de japana soldato, okazinta antaŭnelonge en regiono de la mueleja teatro.

Ĉirkaŭiginte la stratojn, oni arestadis la tutan renkontigantan en la domoj junularon, kaj tiamaniere estis arestitaj ĉirkaŭ 50—60 homoj. Baldaŭ post tio ĉi, agentoj de Kriminal-esplora fako arestis en la domo N 45, 3^a Krugovaja strato, Aleksandron RUMJANCEV, 17-jaron; kaj alian tagon oni prenis ankaŭ lian patron. Merkrede japanoj kondukis la patrinon al Amurskaja strato kaj tie, en stalo de japana milita loĝejo, montris al ŝi la filon.

De li oni postulis konfesion pri la mortigo de la japano kaj denuncon de la kunkulpuloj; neniam dokumentoj, armiloj, pruvoj estis trovitaj.

Ĉar Aleksandro RUMJANCEV nenion povis atesti, lin oni komencis, ĉeeste de la patrino, torturi, kunforĝante per feraj ringegoj la kapon, manojn kaj kruojn; trifoje lin oni rekonsciigadis kaj denove turmentis. Poste la patrinon oni forsendis. Sabate ree oni kondukis al la sama ejo la patrinon; ŝian filon oni torturis per akvo: alligis al malplena lito, sidiĝis sur lin kaj el bareleto komencis verŝi akvon en la nazon kaj buŝon, tiel ĝis kelkfoja perdo de l' konscio. Eldevigita per torturoj, li estis konsenta preni sur sin la kulpon, nur lin oni mortigus kaj ĉesigus turmenti kaj petis la patrinon certigi tion.

Poste oni devigis la patrinon propramane torturi sian filon kaj, kiam ŝi estis rifuzanta, batis ŝin per bambuoj. Multajn aliajn faktojn oni povus raportoj. Tiu ĉi sufiĉas por montri, ke nun ĉiu ruso povas trafi japanan turmentejon. Mortigo de japano estas pretekso por aresto sen esploro kaj por turmentoj. La posedaĵo, vivo kaj animo de ĉiu ruso estas en la manoj de armitaj japanoj. Kun bajonetoj kaj torturoj ili venis al ni por starigi personan sendanĝerecon kaj ordon; per iloj de la mezepokaj ekzekutistoj ili firmigas la bonnajbarecajn rilatojn. —

Ruknemi.

(1) Nomate ĉirkaŭaĵo — 6 verstoj de la urbo Vladivostok.

La 2^a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda

okazos en

Frankfurt a. M. (Germ.)

la 12—16 aŭgusto 1922

Detaloj aperos en marta n^o

Kion rakontas la policeja ĉelo

De ALBIN BERNHARD (1).

Neniu povas kulpigi min, ke mi estas tro babilema. Mi pasigas mian solecan vivon en trankvila agrableco kaj estas kontenta pri mia sorto. Mi ja ankaŭ ne povas fari alion.

En silenta izoleco mi filozofas, samkiel agas tiuj, kiuj jam de longe estas perdintaj la konfidon al la homaro.

Ĉiuj miaj fratinoj kantas la saman kanton, silentan kiel mi. Nur malofte sonoj de nia kantado enpenetras la publikon. Sed se tio okazas, la aŭskultinto skuas sin pro timo kaj nomas sin feliĉa, nehavante interkomunikigon kun ni. Laŭ sciigoj tamen ekzistas homoj, kiujn trankviligas mia estado kaj kiuj pravigas mian ekzistadon. Strangaj homoj! — Al ĝojo mi ne servas. Mian tutan vivon plenis malgajeco, nur maloftaj estas gajaj momentoj.

Neafabla estas mia eksterajo, neagraba mia interno. Malbonan odoron mi eligas. Tamen ŝajnas al mi, ke mi plaĉas al homoj, pleje al tiuj, kiuj ne pretendas min.

Mi memoras pri tempo, kiam mi ankoraŭ havis idealojn. Estis tiam, kiam mi pli kaj pli fariĝis soleca. Tiam mi revis pri mia disiĝo kaj pri la feliĉo de la homaro. Sed subite la bela sonĝo aliĝis en terure malbelan. Nun mi estas malreviĝinta kaj ne plu kuraĝas esperi Tiam!

Mia situacio estis la sama kiel hodiaŭ. La karbejo kaj la porkstalo estis miaj dekstraj, la buĉejo por neplenvalora bruto kaj la domvestiblo miaj maldekstraj najbaroj.

La muŝtruo en la brulpumpilejo estis jam de longe forlasita kaj forgesita. Mi estis modernigita. Tabullito sufiĉis kiel meblaro kaj vitrumita truo en la muro estis luksa aranĝo.

Longtempe mi estis atendanta enloĝonton. Fine alvenis iu. Juna freŝa, vivema homo, vaginta. La policano kaptis lin. Nun li konatiĝis kun mi. Ŝajne li ne estis ĉagrenita pri tio.

Poste oni enirigis alian personon. Tiu estis plenebria. Li kriis kaj furiozis. Krom tio li ne emis al pureco, kaj li tute ne plaĉis al mi.

Sekvantan tagon li rigardis min mirigite kaj estis tute alia ol dum pasintaj horoj de la senlima gajeco. Lin verŝajne estis tro impresiginta.

Tiutempe regis trankvileco kaj ordo en la lando, ĉar la neriĉaj popolanoj estis estrataj de bonkora, pia kaj severa reganto, kiu ŝategis trinki vinon.

En la urbeto loĝis malriĉa, sed kuraĝa vidvino, kiu adoris sian reĝon. Dum nokto sonĝe li estis aperinta al ŝi. Al li ŝi nun donis signon pri sia neevitebla estado kaj postulis ne pli kaj ne malpli ol permonan helpon por ke

(1) La vera nomo de la verkinto estas *Albin Schmieder*. Li ne estas profesia spirit-laboristo; lia porpanakira laboro estas kompostado. Antaŭmilite li eldonis revuon pri vegetaria vivmaniero, kaj ĉiam li tre interesiĝis pri la porvivaj demandoj de la proletario. Albin Bernhard jam de longe favoras esp. on. Dank' al li ĝi estas enkondukita en „Weinböhla bei Dresden“, tiea popoldomo. Tamen tiu pioniro de la laborista movado ne lernis nian lingvon pro tro granda okupateco. Ano de la *Sende-penda Socialista Partio*, li estas deputato en la komunuma parlamento (vilaĝparlamento) de sia loĝloko. — *La Trad.*

malgrandiĝu ŝia malriĉeco. Amego plenigis ŝin kaj oferante tempon kaj inkon, ŝi provis atingi la celon.

Sed la virino ne estis spertinta pri la irado de petskribo, direktita al moŝto, kiun persone surtronigis Dio. — En iu oficejo ŝia letero estis haltigita.

La oficejo transdonis ĝin al la urbestro, por ke oni ekzameni la spiritstaton de la forsendintino. Jen la rezultato: »Eksterlandanino; spirita malkapableco«. Jam de longe la estraro opiniis, ke la vidvino devus enloĝi frenezulejon. La pruvon por tio ili nun havis. Oni ordonis ŝian transporton. Ŝia konfidemo havis malbonajn konsekvencojn.

La personigitan, lokan potencon armitan prezentis la noktolicano. Tiu ĉi staris malfruvespere antaŭ mia pordo. Lin akompanis la vidvino, estinte fidela al la reĝo kaj nun seniluziigita. Mi devis gastigi ŝin dumnokte.

La policano ĝojis, ke li fine povis enirigi la virinon. Ĉiam ŝi sukcese evitis la prizorgan atenton lian.

Nun ili interdisputis pri tio, kiu de ambaŭ unue estas transpaŝonta mian sojlon. La »estraro« fine decidis eniri unue, por ke ĉesu la afero. Mi malfermis mian pordon. Samentempe la armita figuro falegis en miajn brakojn, eniginta tro rapide laŭvole de la energia virino. Tiu ekstere ridis, sed en mia interno, petegis, furiozis la malliberigita potenco.

Dum longa tempo mi estis la dumtaga interparolado de la gevilagaĵoj. Ridante mokemuloj disvastigis la rakonton pri la sukcesa malestimo de ŝtata institucio.

Tio okazis, kiam ekzistis idealoj kaj la serena krimnaleco.

Poste alvenis pli trankvila tempo. La viroj foriris al la militkampoj. Ŝajne mi estis orfita kaj forgesita — pri kio mi ege ĝojis. Sed mia ĝojo ne daŭris. Baldaŭ pulsatis nova vivo en la loko kaj baldaŭ mi ree havis gastojn. Novaj homoj enloĝiĝis, tute pli diversaj ol la estintaj. Ili aspektis malgajaj, elĉerpitaj, maltrankvilaj kaj suferantaj.

Iutage oni memoras pri mi. La pordo malfermiĝis kaj kvar fortaj brakoj enŝovis maljunan viron. Lia vestaĵo estis griza, liaj gestoj nervekscititaj. Kion li diris? »Dum kvin longaj jaroj malsatinta kaj suferinta! Tiu maniere nun la patrio dankas al mi! Ĝi estas krediginta mensogojn sciigitajn de kanajloj kaj enigis min ĉi tien!«

Ho ve! Tio estis malbonaj vortoj, post kiuj sekvis pli malbonaj faroj,

Kvar fortaj brakoj atakis batante la senkulpulon. Li kriis. Unu el la atakantoj ekkaptis lian gorgon, dum la alia daŭrigis la batadon. Elĉerpita la senhonorigito falis teren. La gumobatiloj estas farintaj abomenan laboron. Tio ne estis feliĉa ekveko por mi. Tremante pro honto kaj abomeno mi deziris, ke al la gumbatile armitaj krueluloj servu mia propra »Mi« por eterna loĝejo, por ke ili estu apartigitaj de la homaro. — Sed — — tio restis nur deziro.

Apenaŭ estis malsoninta la ĝemado, okazis nova pli granda ekscito.

Mi devis servi kiel azilo al du mortigintoj. Al mortigintoj! Ekstere bruis la popolamaso. Tian mi ne travivis ĝis nun. Poste mi sciigis ĉion. Embuske la mortigantoj mortpafis senzorgan homon. Tio estis abomena.

Plue mi sciigis, ke altigitaj, »feraj« viroj estis instruantaj la homojn en la tuta lando pri mortigo, ke ili ordonis tiun krimon kaj rekompencis la farintojn.

Lerninte kaj plenuzinte tion, la mortigintoj daŭrigis la krimon laŭkutime. Kruele estis la kaŭzo, samkruele la efiko. kruele ankaŭ estos la puno.

Ĉenigite kaj senhelpe ili pasigis la nokton en mi. Sed — — — antaŭ ol funkciis la justeco, aperis la gumobatiloj denove. Du policanaj pugnoj traktadis senkompatate la korpojn iliajn.

Tiuj scenoj ripetis pli ofte. Du junaj homoj estis arestitaj dum ili ŝtelis, kaj poste povis pripensi ĉe mi la malbonfaron. Ankaŭ tiuokaze la gumbatiloj eklaboris. Sed la batitoj siaflanke klopodis pri rajto. Ili postulis, ke la prokuroro devas puni kaj forpeli la batemajn pugnoj. Sed krom mi ne ekzistis aliaj atestintoj. Mute mi devis konservi la sekretojn.

Estas ekscitiga tempo por mi — — policeja ĉelo. La homoj ankoraŭ ne volas malbezoni min. La griza realeco estas pli severa ol ĝis nun. Ĝiaj multnombraj viktimoj vizitas min. La mondo estas aliĝita kaj mi ne rekonas ĝin. Mi devas esti stacio por justeco. Sed kiel ejon por turmentado kaj krueleco oni faris min. — Eduki kaj plibonigi nur povas humana puno. Sed mia ekzistado malhumiligas kaj malbonigas. Novan suferadon kaj malfeliĉon estigas la gumbatile armita pugno de la moderna policano.

Dum miaj neokupataj horoj mi dediĉas al revado denove. Mi imagas, ke mi estas superflua. Homoj, vivantaj estonte estu informitaj pri mia malmoderna ekzistado nur per kronikoj. Ankoraŭ la tempo ne estas veninta. Sed miloj da saĝaj kapoj jam komencis la detruadon. Miaj muroj estas frapataj, batataj. La homa mizero alvokas helpon; la premeĝita animo sopiras liberecon. Mia detruo estos la venkohoro de la homa prudento. — Jam mi eksentas ŝanceliĝon. Se ĉiuj fosas, mi baldaŭ estos la tombo, preparita al la tiraneco.

El la germana esperantigis *Sennheredigito*.

El Nederlando, la lando de lakto kaj mielo

Ega senlaboreco kaj malsato regas ĉi tie. En la urboj kaj vilaĝoj kaj sur la nigreta erikejo la fantomo de senlaboreco iradas de domo al domo, postulante siajn viktimojn. Kvankam la laboristaro en la urboj estas ankaŭ trafata, la situacio ekster la urboj, sur la kamparoj estas eksterordinare pli kriza. Raportisto de la gazeto *De Telegraaf* vizitis malriĉan Friesland'on kaj sciigis jenajn faktojn en la gazeto.

»Vivi, — ĉu vi scias, kiel tiuj ĉi homoj vivas? Mi komprenigos tion al vi. Mi estis en multaj kabanetaĉoj kaj ... jes, verege, subteraj kavernoj sur la Schoterlanda erikejo. Unue mi venis en la plej bonajn. Fuŝe kunmetitaj etaj lignaj kabanoj, enhavantaj ĉambreton kaj kelkajn alkonstruitajn dormejetojn en kiuj iom da ĉifonoj.

La plankoj konsistas plejofte el piedpremita argilo, kelkfoje nur el torfhava grundo de la erikejo kaj nur esceptokaze el ligno. Mi venis en kabaneton, ege etan kaj sensignifan, sed aspektantan iom belete. La planko estis el ligno, pri kio fieris la junaj loĝantoj: virineto de 18 jaroj kun ŝia edzo aĝanta kelkajn jarojn pli.

Ili havis infanon de kelkaj monatoj, kiu estis kaŝita en veturileto sub amaso de ĉifonoj kaj restaĵoj de litkovrililo

lanaj. Ĉio aspektis ankoraŭ sufiĉe freŝa, la virineto eĉ havis ankoraŭ sanan ruĝon sur la vangoj. Sed tiuj ĉi du homoj »vivas« kune per 3.25 Guldenoj en unu semajno. Kaj mi jam vidis sur la vizaĝo de la juna viro la trajtojn de malespero. Kaj mi pensis pri tio, ke nur daŭros kelkajn jarojn, ke ĉia freŝeco estos perdiĝinta. Post kiom da malmultaj jaroj tiuj ĉi tri homoj forvelkos en la malĝoja mizero de la erikeja malriĉeco?

Mi venis en alian domon en kiu ankaŭ vivas du ankoraŭ junaj homoj, havantaj infanon de unu kaj duona jaro. Enspezo po semajno ankaŭ 3.25 Guldenoj. Tie la procedo de malboniĝo jam forte progresadas kaj la mizero jam estis antaŭvidebla. Volante gajni la koron de la gepatroj, mi diris ion afablan pri la belegaj Frieslandaj bluaĵokuloj de ilia infano. Sed la edzo plendis, ke la infano fartis malbone. Ĝi aĝis jam jaron kaj duonon, sed ankoraŭ ne povis kuri aŭ paroli. Mi iris al la infano volante mankaresi ĝin. Sed ĝi komencis strange plori kaj mi rimarkis, ke ĝi estis idiota.

Mi eniris alian kabaneton, tre malgrandan kaj kadukan, kaj ĉie malfermitan pro vetero kaj vento. Knabo proksimume dudekjara staris malĝoje kaj silente kaj alrigardis nin, kaj estis ia suspekto kaj malamo en liaj okuloj, dum ni estis parolantaj kun lia fratino, kiu diris ke ŝi havas dekok jarojn. La patro kaj patrino ne estis hejme, ŝi diris, tiuj estis irintaj »en la regionon«. Ĉu vi scias la signifon de tiu »en la regionon«? Tio signifas: eliri por ŝteli kaj almozpeti, trovi kiel ajn tie ĉi aŭ tie ian kaptajon. Kaj ni renkontis multajn, kiuj estis »en la regionon«. Mi parolis pri ĉiaj aferoj kun la knabino, kiu respondis niajn demandojn, ridante iom apatie, per mallongaj abruptaj vortoj. Kiomope ili estis? Dekduope. Sed kie do, pro la ĉielo, dormis tiuj homoj? Ree oni montris al ni du de tiuj abomenindaj dormejetoj; tie dormas dek personoj, mi kaj mia fratino sur la tero.

La grundo estis kaĉsimila miksaĵo, konsistanta el sablo kaj argilo. Mi ne bezonas diri, ke ni ne povis trovi tie ĉi ian signon de freŝeco. La nigra malboniĝo tie ĉi jam estis fariginta putriĝo. Kaj tiel ni vidis multajn kabanetojn kaj multajn familiojn.

Ankaŭ ni vidis akvoputon, — el kiuj la homoj ĉerpas akvon por kuiru terpomojn kaj pretigi kafon — se eble. Tiu putro estis truo en la erikejo kaj sur ĝia fundo troviĝas ia flava, laktosimila fluidaĵo. Tio nomiĝas akvo!

Kaj ni vidis ankaŭ alian modelon de loĝejoj; la duone putriĝintaj, kaj pro tio sur la tero metitaj loĝboatoj.

En unu el ili ni estis. Loĝata de edzo, edzino kaj ok infanoj. La plej juna infano havis tri jarojn. Suĉinfano ĉar la patrino suĉigas, kiam ne estas io alia. La patrino havis unu brakon malbonforman pro ulceroj kaj la kapeto de la knabeto estis ankaŭ kovrata de tiuj ulceroj.

La familio ĝuste tagmanĝis, la manĝaĵo konsistis el terpomoj kaj kaĉo el maldelikata, sekala faruno kun akvo. Tiu lukso estis ebla, ĉar la edzo havis laboron ĉe malgranda kulturado de la preĝeĵstraro en proksima loketo. Dume ni estis parolantaj, la edzo ekstaris, kaj foriris, salutante nek la edzinon, nek la infanojn. Ni vidis lin iri al la laboro, laca viro sur la malseketa, nigra erikejo, kaj malrapide li malaperis en la nebulon. Poste ni vidis lin

labori kun kvin ses aliaj. Sed kiom, estas kvin, ses viroj laborantaj el la centoj da ili, kiuj ne laboras.

Fine ni vidis la plej abomenan, la plej nekredoblan kaj netolereblan: la kavernojn subterajn. Du el ili vizitis ni. Kaj estis naŭzige. Tiuj kavernoj konsistas el amasigitaj sabloj kaj eriktavoloj kun kelkaj truoj en ĝi kaj kavo interne. En unu truo pendas pere de ŝnuro aŭ malnovaj strietoj de ledo malgranda lignomuro, kiu memorigas pri pordo. La alia truo, supre, estas fermita per kelkaj malnovaj tabuloj. Tra la malfermaĵoj trafalas iom da lumo internen, nur tre malmulte, ĉar se trairus pli da tio, ankaŭ trairus pli da malvarmo. Krome la malfermaĵoj ankaŭ servas por forkonduki la fumon de malnova forneto sen tubo. Interne estas tiel mallume, ke oni devas esti tie kelkan tempon antaŭ ol oni povas distingi ion. Kaj tiam oni vidas viron sidantan sur la grundo, kaj virinon kun infano sur seĝo. Plie tablon, la malnovan forneton, konturon de taseto kaj nigretan amason da ĉifonoj sur la grundo — la »lito«.

Mi ne povas rakonti plion pri tio. La fotografisto akompananta min, havis la kuraĝon irigi la homojn eksteren, por ke oni povu vidi, kiel fariĝas la homoj pro malriĉeco kaj mizero.

En la dua kaverno, kiun ni vizitis, ni trovis maljunan viron 78 jaran. Li estis sola, ĉar lia filo, kiu loĝas ĉe li, estis »en la regionon«. Li nur sidis, kaj atendis je . . . nenio. Ankaŭ li havis forneton, sed ĝi ne brulis. Ĉu li ne devis kuiri terpomojn? Li ne havis terpomojn. Kaj ankaŭ ne torfon

Ĉi suprajn liniojn ni tradukis el la laborista gazeto „*De Arbeid*“. Tia estas la situacio en nia benita Nederlando. Kaj dume la registaro ĉesigas doni sian financon helpon por loĝejkonstruado, malpliigas subtenmonon al la senlaboruloj, unuvorte: faras nenion por plibonigi la situacion. Sed ni ne miru pri tio. Ni ja scias, ke la proletario nur povas helpi sin mem. Do ni batalu por la forigo de la kapitalista sistemo, por la starigo de la Socialismo.

(Nederl. Laborista Esperanto Servo.)

(1) Oni traduku kaj diskonigu ĉi tiun artikolon. Sendu la gazetojn al la adreso: Alleeweg 9, Enschede, Nederlando.

Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Decembro)

Anglio: Mark Staar 5.75 fr.; J. Wtaker 4.10 fr. — **Egiptio:** Cohen kaj Aboaf 7.75 fr. — **Francio:** G. Hugot 5 fr.; Beuves 5 fr.; Suruguns 6 fr.; Magnus Focké 1 fr.; Libristo 15 fr.; L. Calento 1 fr.; Migeon 3 fr.; Ruyar 10 fr.; J. Besnard 5 fr.; L. Glodeau 10 fr.; E. Lanty 100 fr.; Satano 159.55 fr. — **Kanado:** Tom A. Allan 13.50 fr. — **Svisio:** Girardin 4 fr.; Humbel 4 fr. — **Usono:** Froding Karl 6 fr. — **Bulgario:** Atanzof 5 lev.; Matev 10 lev. **Germanio:** K. Deubler 10 mk. G.; Manske 5 mk. G.; Fischer 2 mk. G.; J. Burger 3 mk. G.; Jean Roth 12 mk. G. — **Hungario:** Sturm 20 kr.; Guiheneuf 2230 kr.

S u m e : 346.65 Frankoj; 15 levoj; 32 Markoj G.; 2340 Kron.

Fakto, ke burĝaro nin malamas estas unu el la plej okulvideblaj pruvoj de la vero, ke ni ĝuste montras al la popolo vojon kaj rimedojn por forigo de l' burĝaro. Lenin

Kiel lumantaj vermoj, la religioj bezonas mallumon por lumi. Schoppenhauer

XIV Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki — Helsingfors, Finnlando, la 6—12 de aŭgusto 1922.

Tria Komuniko (mallongigita).

Aliĝo. La aliĝilo nun estas preta kaj sendita kun la Esperanta gazetaro en ĉ. 40,000 ekzempleroj. Se iu tiel ne ricevis la aliĝilon, bonvolu peti ĝin de la L. K. K. Ni reatentigas, ke nur aliĝoj kun kotizo estas registrataj. La jam aliĝintoj estas petataj pleniĝi kaj alsendi la aliĝilon.

La L. K. K. iniciatos, ke diversaj fakaj organizaĵoj invitu kaj aranĝu la fakajn kunsidojn. En niaj komunikoj ni informos la adresojn, al kiuj povas sin turni la samideanoj, kaj laŭeble la societojn invitantajn.

Laboristoj. Laborista Esperantista Societo «Unueco» kaj la Kleriga Ligo Laborista (Finnlanda). Adreso ĉe Työväen Urceiluliitto (Laborista Sportligo), Eläintarhantie 1, Helsinki.

La Loka Kongresa Komitato

Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensendo): XIV Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando.

Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

La vero pri oficialigo de esperanto en Rusa Sovjetio

Antaŭ preskaŭ du jaroj, S^o Edm. Privat petis, ke oni „kiel eble plej brardu“ pri la oficiala alpreno de esp.o en Rusio. Poste venis duonmalkonfirmo. Kaj neniam ni povis ricevi precizigojn pri la fonto de tiu fanfarona informo.

Lastatempe S^o M. S. Valentinov sendis al ni la ĉi-suban informon, kaj atestige eltranĉaĵojn de la gazetoj en kiuj aperis la rilata noto. Neniu esperiga dubo estas nun ebla.

En venonta n^o ni pritraktos iom ĉi-tiun aferon kaj ties konsekvencojn por nia propagando. Hodiaŭ ni nur diru, ke neniam kaj neniel ni devas blufe fanfaroni. Plej granda seriozeco kaj objektiveco devas estri nian agadon; aliel ni riskus ridindigi kaj forte domaĝi nian noblan aferon. — Red.


La 23-an de Majo 1920, en Ĥersono, la subskribinto interparolis kun Komisararo de popolklerigaj aferoj, K^{do} Lunaĉarskij, kiu skribis sekvantan rezolucion sur prezentita al li raporto: „La registaro de R. S. F. S. R. permesas lerni esp.on fakultative kaj egale kiel francan, germanan kaj anglan lingvojn.“

Nun la 21-an de Decembro 1921, en Moskvaj gazetoj „Izvestija“ (Sciigoj) de plenumkomitato, N. 237 kaj en „Trud“ (Laboro) N. 244, aperis sekvanta informo:

„Pri Esperanto“. Ĉefpolitikleriga Fakoj pro demandoj el diversaj lokoj pri instruado kaj lernado de lingvo esp.o, klarigas, ke opinii la lingvon esp.o, kiel internacian lingvon, indan de ekskluziva registara atento, estas nun antaŭtempa. La esperantistaj rondetoj estas privataj organizaĵoj. Ekzistantaj sekcioj de esp.o ĉe politiklerigaj fakoj en kelkaj urboj devas esti likvidataj.“

M. S. Valentinov

ano de Centra Komitato de Sovjetlanda Unuiĝo



La Angulo de l' Poetoj

HIMNO DE L' LABORISTOJ

(el Minskoj).

Pli kaj pli proletarioj unuiĝu! —
 Nia volb, kaj potenco, kaj fortik'!
 Por la lasta fest — batalo kolektiĝu, —
 Mortu nia kontraŭulo malamik'!

Garde staru ĉirkaŭ tuta nia mondo
 Kaj antaŭen marŝu ni en ĝusta hor' ...
 Falos baldaŭ antaŭ la popola ondo
 Malamiko kaj ekĝojos nia kor'!

Mond' aperos el ruinoj post brulado,
 Per la sango akirita nova mond';
 Laborist', kun ni kuniĝu, kamarado, —
 Sed sinjoroj iru for el nia rond'!

Kamaradoj! per feliĉo ebruiĝu, —
 Sur la tero ĉio nia estas nun!
 Pli kaj pli proletarioj unuiĝu, —
 La standard' por ni nun estas ruĝa sun'!

Esperantigis V. N. Devjatnin.



EL SONGO

En viaj okuloj mi vidis profundon ĉielan —
 Kun ĝia stelaro;
 En tonoj de l' voĉo mi aŭdis muzikon anĝelan,
 Kaj flustron de maro
 Dum trankvila, sennuba veter!

En viaj karesoj mi sentis varmecon kaj amon
 de mia patrino;
 En kisoj pasiaj mi trinkis venenon — balzamon
 De la amatino
 Dum printempa intima vesper!

Murmuris folioj. Ektrilis kantist-najtingalo
 En parko-ĝardeno ...
 Apogis vi Vian kapeton kun blua vualo
 En la duonsveno
 Sur la bruston al mi en ĉi-hor!

*

Foriris mi poste por longe. Vi restis ploranta
 Post mia foriro.
 Respondis Vi miajn leterojn en sento kreskanta
 de akra sopiro,
 De malĝoj' kaj kaŝita angor' ...

*

Sopiris mi ankaŭ reveni al Vi, mia karo,
 Sopiris kareson,
 Deziris ripozi sub Via zorgad' en kamparo
 Kaj trovi, forgeson
 Post laciga, maldoĉa solec!

*

Okazis alie ... Vi mortis infanon naskonte ...
 Mi vin ne revidis ...
 Seleo ... Ĝi iras, al mi ĝi rikanas renkonte,
 Ĝi min ne perfidis!
 Mi Vin ploras, trezor' de l'junec!

El »La Unua Ondo«, kolekto de
 originalaj versaĵoj, eldonitaj en
 Saratov (Rusio) 1918.



ELTOMBA KANTO

de Tumanjane H.

Iam se, amiko kara,
 Tombon mian vi vizitos
 Kaj floriĝon bonodoran
 Belan tie vi ekvidos.

* * *

Do ne pensu, ke nur simplaj
 Floroj tie elkreskadis
 Ke loĝejon novan mian
 La printempo ornamadas ...

* * *

Ili estas nekantitaj
 Kunportitaj kantoj miaj,
 Ili estas nediritaj
 La amvortoj miaj varmaj ...

* * *

Ili estas kisoj miaj
 Kiujn mi al vi forsendas
 El la mondo, kies vojo
 Per la tomb' fermita estas.
 El la armena lingvo tradukis Narciso.



Desegnaĵo de Louis Moreau

Pri bataliloj

Por gvidi batalon oni bezonas armilojn. Armiloj per si mem estas neŭtralaj. Ili nenion scias pri malamo kaj ĉiam nur servas al la posedanto. Al kuglo estas tute indiferente, ĉu ĝi traboru mian kapon aŭ la vian. En okazo, ke ekkaptus atakato la minacantan batalilon, tiu similus al glavo tranĉa ambaŭflanken.

Trafa ekzemplo por tio ĉi estas la germana revolucio de la 9^a de novembro. Same instruas la hungaraj revolucio kaj kontraŭrevolucio kaj la okazoj, kiuj estas konataj sub la nomo »Munĥena sovjetrespubliko« kaj multaj aliaj. Ĉio ĉi montras, ke armiloj en batalo, se sukcesas perfido utilas al la malamiko.

Tiu ĉi aserto estas pruvata per la fakto, ke la ĝis nun ĉiam venkintaj reakciuloj ja ne produktis mem la armilojn, sed, ke la armiloj, kiuj estis kaj estas la rimedoj por sukceso en sango la ribeladojn de la subpremata klaso, estas produktoj el laboro de la sklavigitaj mem. Oni povas rigardi la aferon de ĉiu flanko, la hontemiga fakto restas: Tiuj, kiuj ne partoprenas la riĉaĵojn de la tero, tiuj, kiuj kiel sklavoj devas laboradi, nur por havi nesufiĉon por manĝi, tiuj, kiuj pro la nombro jam estas pliege fortegaj ol la ekspluatantoj, mem liveras al tiuj ĉi la subpremojn, per kiuj la subpremantoj konstante minacas al la malsatantaj ribelemuloj, por ke la „sankta kaj la justa ordo“ neniam estu tuŝata.

Miregante oni demandas: Kiel tio nur povas okazi? Tre simple. La senposeduloj devas labori por nutri kaj vesti sin. Unuj produktas ŝuojn, aliaj meblojn, kelkaj maŝinojn kaj armilojn. La ŝtato, inter kies fundamentoroj ankaŭ troviĝas la »kvina ordono«, edukis tiel la regatojn, ke oni ne trovas ian malbonon ĉe tia metio. Ja ankaŭ ekzistas cigar- kaj bierfaristoj (»honorindaj homoj«, kvankam ili produktas venenojn). Kaj la alia flanko: La laboristoj en la armilfabrikoj ne havas la kuraĝon konfesi, ke estas malbona farado, krei mortigilojn. Ankaŭ ili timas, ne trovi alian laboron. Ili ne kuraĝas resti kelkajn mo-

natojn sen laboro kaj blinde pensas: mi kaj mia familio devus morti pro malsato, se mi aŭskultus la riproĉojn de la konscienco. Por si mem kaj por la aliaj ili trovas multajn mensogetojn por kaŝi la malkuraĝon. Sed ankaŭ multaj sekvis la voĉon de la konscienco kaj pruvis per metioŝanĝo, ke konsekvencema proletario per iomete da persistemo akiras venketon super la kontraŭsocialeco.

Kelkaj armilfarantoj argumentas jene: Ni bezonas batalilojn por la klasbatalo, por la Ruĝarmeo. Estas necese seniluziigi la revemulojn pri »ruĝarmeo«, por ke ne ekestu iam fratmilita mizero. Ke en kapitalista, imperialista ŝtato, kies kontraŭrevolucia registaro estas helpata de pseŭdaj kaj naciemaj socialistoj kun granda sekvantaro, ke en tia ŝtato neniam povas sukcesi revoluciema armeo, tio estas sendubige pruvata per la bataloj en la Ruhrregiono en marto 1920 kaj en meza Germanio en marto 1921. La perfido ĉiam laboras pli rapide ol la organizantoj. Ruĝarmeo ĉiam estas danĝero, ĉar dum bataloj la enloĝantoj de la batalejo suferas pli ol la kontraŭuloj mem. La pasinta milito montris, kiajn frenezaĵojn batalantaj armeoj povas fari pro milita neceseco. Kaj kiel imperialistaj armeoj eĉ dezertigis proprajn landojn por malhelpi al la malamiko, tiel ankaŭ faros ruĝa armeo en la furiozo de l'batalo. En tia armeo ankaŭ aperus individuoj, kiuj, servinte hieraŭ al kontraŭrevoluciuloj, hodiaŭ servas al ties kontraŭuloj, eble nur pro pli alta pago. Tiajn fiulojn ankaŭ allogas ebla rabotajo. La faroj de ili ĉiam estas uzataj kiel propagandmaterialo kontraŭ la revoluciemoj. Hölz⁽¹⁾ mem ja ne estas responda por la faroj de sia sekvantaro. Ni lin devas juĝi bonintenca homo, kiu nur makuligis per la rimedoj, kiujn li uzis. Malvera do estas la parolo: La celo sanktigas la rimedojn. La armiloj estas mortigiloj, ĉar ili estas por mortigi. Ĉiu, kiu portas, kaj eĉ tiu, kiu produktas armilojn, estas mortiganto, ĉar jam la intenco mortigi (kaj la kunhelpo antaŭ la faro estas krimoj) kontraŭ la sankta vivo, kiun amas ĉiu kreaĵo super ĉio.

Ekkoninte tion kaj ankaŭ la fakton, ke kontrakti kaj kunlabori kun la subpremanto, en ĉiu ajn formo, ĉiam nur utilas al la lasta kaj nur ŝajne al la ekspluatatoj, ekkoninte tion, antaŭenema kaj liberema proletario devas demandi sin, kiajn rimedojn li devas uzi por gvidi la batalon, por realigi la idealon.

Restas multegaj rimedoj propagandaj kaj ekonomiaj. Krom paroladoj ĉefe la gazetaro estas gravega rimedo. La internacia kongreso de la tipografistoj, kiu okazis en la pasinta jaro en Vieno, tre gardeme pridiskutis temon pri la libereco de la gazetaro, kaj tre volonte ĝi estus tute ne tuŝinta ĝin. Fine oni decidis, ke estu preslibereco. Tio estas: ĉiu povas aperigi sian opinion en gazeto tute ne malhelpate. Tre bone! Ni laboristoj ankaŭ ne volas malhelpi al iu, ke li diru aŭ presu, kion li pensas. Sed ni ankaŭ scias, ke en la burĝa gazetaro ĉiutage aperas tiom da mensogoj kaj kalumnioj kontraŭproletariaj kaj ŝovinismaj, ke ni ne povas toleri tion. Se aperas en naciistaj kaj kapitalistaj gazetoj artikoloj, kiuj vangfrapas pen-

(1) Max Hölz estas gvidinto de ruĝa bando dum la printempa mezgermania revolucio 1921.

seman laboriston, oni do devas demandi sin: kiaj estas la kompostistoj, kiuj kontraŭ la propra konvinko, sen konscienciproĉoj kompostis tiajn popol-malamikajojn?

Finige de la 1921^a j. la kompostistoj el presejo en Oranienburg (norde de Berlin) insultis la kolegaron de alia presejo en la sama urbeto, ĉar ili kompostis ian kontraŭ-socialan fiajon. La »Korrespondanto«, organo de la presista ligo de Germanio, pro tio aŭdigis kanton, en kiu ĝi diras, ke la kompostisto (simpla laboristo.) ne havas decidajn kaj redaktajn rajtojn. Kie do restus la preslibereco?! — Ne, ni diras, ke estas necese rifuzi kompostadon en ĉiu okazo, se la artikoloj estas mensogaj kontraŭrevoluciaĵoj. Kiu estas en presejo, kie estas presataj naciecaj aŭ kontraŭrevoluciaj gazetoj, ĵurnaloj aŭ verkoj, tiu serĉu laboron en alia presejo aŭ ŝanĝu la metion — aŭ li estas nominda perfidisto, materialisma kaj spirita sklavo.

Tre ofte okazas kunvenoj, kie la ŝovinistoj kaj militaristoj festas siajn frenezajn militgloradojn. Ili preskaŭ neniam estas malhelpataj, pro la »respublikaj gvardistoj«, kiuj gardas ilin. Kontraŭe kunvenoj de laboristoj kaj revoluciemuloj en la plej oftaj okazoj estas disigataj. Ĉu tiu estas »kunvenlibereco«? Socialistoj de la nuna tempo, se vi defendas liberecon de presado, vi ankaŭ devas defendi liberecon de kunvenado. Pli bone estus, se vi helpus batali kontraŭ la reakciuloj, se vi volas honore nomi vin »Socialistoj«. Kiel bone do estus, se je iu kunvenvespero de la naciistoj veturus nek tramo, nek fiakro, nek aŭtomobilo, kiel bone estus, se ne lumus la elektraj lampoj en la ĉambrego kaj ne servus kelneroj aŭ aliaj helpistoj.

Laboristoj pripensu, ke fakte vi jam havas la ekonomian potencon kaj ne bezonas la politikan. Al kapitalisto ne utilas la kapitalo, la ejoj, maŝinoj kaj materialo, se vi rifuzas viajn brakojn. Al la reakciuloj kaj popolmalamikoj ne utilas gvardioj aŭ armeoj, se vi ne plu produktas armilojn.

Ili nur elpensu kontraŭstrikajn leĝojn. Por praktike uzi leĝojn ili bezonas potencon. Se vi ne donas al ili la potencon per produktado de pafiloj aŭ glavoj, iliaj leĝoj restas senefikaj.

Ekkonu, ke via forto nur estas la ekonomia, kaj ke la politika potenco nur estas fantomo, sen armiloj kaj municio. Vi ne privenkas la malamikon per tio, kion vi faras, sed simple per tio, kion vi ne faras.

La kontraŭsocialismo estas venena kreskaĵo. Salajraltigo, kiu nur valoras por unu monato estas kiel deŝiro de unu floreto de ĝi. Nur ĉe la radikoj vi povas pereigi ĝin. Estas necese, ke ni ekkonu nin kaj niajn kunulojn. Estas necese, ke ni ĉesu fosi nian propran tombon. Estas necese, ke ni alvoku ĉiujn subprematojn por solidareco. Solidareco estu nomata la uniformo de nia ruĝa armeo, ĝia armilaro estu rifuzo. Nia venko ne estu subpremo niaflanke, sed amo, aboro, bonfarto por ĉiuj.

Homo.

Nenion oni donas tiel malavare, kiel siajn konsilojn.
La Rochefoucauld (elp. La Roŝfuko).

El niaj leteroj

»... Blindaj estas tiuj, kiuj ne komprenas, ke sin oferi por propagando de esp.o eblas nur tiam, kiam ni vidas en ĝi ne ŝparilon da mono al grandkomercistoj, sed liberigilon de homaro el naciismo, militarisma sklaveco. Bedaŭrinde, multaj, tre multaj esperantistoj tion ankoraŭ ne komprenas, kaj ne komprenante ĝin ili deprenas al si plej gravan motivaĵon por propagandi esp.on.

Dank' al Dio, S. A. T. tiun ideon klare eldiras kaj mi esperas, ke tiu potenca ideo, kvankam komence kontraŭbatalata, tamen baldaŭ altiros ĉiam pli kaj pli vastajn esperantistajn rondojn. Nur tiuj ideoj devas esti prezentataj al esperantistoj en alloga romana formo kiel ekzemple la estonta socialismordo estas pritraktata en fantaziaj romanoj. Eble vi povus instigi iun talentan samideanon, ke li bonvolu enkorpiigi la tutan celadon de S. A. T. en allogan, interesan, hipnotigantan nin romanon formon. Kiam ni havos tian, venkantan la homan menson, nian ĉeflibron, tiam propagando de niaj ideoj fariĝos ja multe pli facila. — X. X.

Plej aprobinda estas la ideo de nia sennoma samideano (tia pro blanka teruro en lia lando). Jam letere ni instigis niajn poetojn, ke ili verku himnon al la sennaciismo.

Certe troviĝos inter ni poeto por kanti, verkisto por romane popularigi nian idealon kaj teoriisto por ties starigi principojn:

*

Mi esperas ke almenaŭ kelkaj kamaradoj el »neŭtra« klubo aniĝos al S. A. T.

En la klubo estas malfacile scii kiu estas »samideano« aŭ ne, ĉar oni ne permesas diskuton pri politiko nek religio. Samtempe, oni vendas tie la »Sankta Biblio'n«, kaj iu diris al mi ke oni gastigis tie episkopon kaj anon de »Salvation Army«: krome oni publike anoncas diservojn ĉe preĝejoj! — Oni ne diskutu pri politiko, sed estas tie, kiel ano, poliestro de Scotland Yard, kiu havas la specialan taskon zorgi la reĝon. — — — — —

Mi esperas ke baldaŭ ni komunistoj starigos nian propran klubon. — — — — — Londona „Satanino“.

Interhelpo

Mezaĝa laboristo (fraŭlo) tre deziras dum kelkaj semajnoj viziti Francion — kaj deziras dum sia restado tie loĝi ĉe esperantoparolanta persono. Ĉar li tute ne scias la francan lingvon. Afablan respondon — kun la surskribo — *Sveda laboristo* — bonvole sendu al S^{ro} L. Glodeau, 177 Rue de Bagnolet, Paris (XX).

Paul Wegener, loĝinte dum 1913 en Rio de Janeiro. — Kiu konas la nunan restadejon de tiu s^o estas petata doni sciigon al s^{ino} Elisabeth Funker, Brandvorwerkstr. N^o 18 II, Leipzig (Germ.) — Elspezojn volonte mi rekompencus.

SCIINDAĴOJ

Ĉe la policistoj. — La adreso de la «*Esperanta Policinformejo*» en Dresden estas Schießgasse 7 (Germ.). La tiea policestraro *oficiale* korespondas esperante. La polica societo nun interrilatas kun tiuj en Paris, Lisboa, Eisenach kaj Wiesbaden kaj kun diverslandaj izoluloj. Entute la esp.a movado inter la polico marŝas antaŭen. La nomita «*Internacia Polica bulteno*» baldaŭ reaperos.

Ĉe la poŝtistoj. — La germana poŝtministro, konsentis, ke la superaj poŝtaj direktoj enketu, kiuj poŝtoj, Telegrafaj kaj Telefonaj oficistoj jam scias aŭ lernas esp.on, kaj ke la superaj poŝtaj direktoj transdonu la koncernajn adresojn al la prezidanto de la Internacia Ligo de Esp.istaj Poŝtoficistoj, s^o la supera registara konsilisto O. Reber en Bamberg.

Ĉe la katolikoj. — Ĉiu scias ke nur personoj dikredantaj povas aĝi lojale kaj prudente. La malbono en la mondo devenas de la satana spirito, kiu regas en la malpiularo. Nu, ŝajnas, ke tiu malvirta spirito ankaŭ enblovis en la Esp. Katolikaro, Ne plu estas tie «*Unu ŝafejo kaj unu paŝtisto*»: Ekzistas *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista* (IKUE) kaj *Internacia Katoliko* (IKa). La du paŝtistoj, S^{oj} Smulders el Udenhout (Nederlando) kaj Metzger el Graz (Aŭstrio), estas en granda malpaco. La unua dediĉis preskaŭ 100 pĝ. el «*Espero Katolika*» por montri la malhonestecon, la perfortemon, rabemon k. t. p. de sia kontraŭulo. Kio okazus, Dio mia, se tiuj sinjoroj ne timus pri inferbruligado kaj aliaj bonaĵoj promesitaj al pekuloj de l' senfine bona dia Moŝteĝulo?!.

Ĉe la neŭtralaj esperantistoj. — Jam ni notis en nia Novembra n^o, ke la elekto de Helsinki kiel kongresurbo por la XIV^a estigis akrajn riproĉojn, flanke de la Dantzigaj esp.istoj. Ŝajnas ke la afero ne ankoraŭ kvietiĝis. Pri tio ni ricevis de S^o Max Amort, unua sekretario de *Dantzigaj Esp.o-Asocio*, artikolon el kiu ni presas la jenon, rilatan al alia artikolo de S^o Frenckel, aperinta en diversaj gazetoj: «... *El la argumentoj de So. v. Frenckel estas klarvideble, ke K. K. K. jam antaŭe decidis kaj proponis faktojn, por ke neniu alia estu pridiskutota. Tio nenie estas kutimo kaj neniam kaj neniel devas fariĝi kutimo ĉe esperantista popolo, kiun estus regonta vere demokrata sento.*»

Humorajoj

DUSENCECO

En kunveno de oficiroj estiĝis akra disputo inter du iunaj leŭtenantoj.

„Jes“, diris unu, „mi neniam vidis idioton pli stultan ol vi.“

„Aŭskultu, sinjoroj“, ekvokis ilia kolonelo, „vi forgesis, ke mi estas ĉi-tie.“

*

SPRITAĴO DE ALEKSANDRO DUMAS

Foje iu demandis malice la francan roman-verkiston Dumas: „Sinjoro, via patro estis mulato, ĉu ne?“

„Jes, sinjoro“, li respondis, „mia patro estis mulato, mia avo estis negro, mia praavo estis simio kaj mia genealogio tie komencas, kie la via finiĝas.“

*

ŜI NEPRE VOLAS EDZINIĜI

Urbestro: „Sed vere, fraŭlino, mi ne povas nun vin edzinigi; vidu, via fianĉo estas hondinde ebria.“

Maljuna fraŭlino: „Ĝuste pro tio, sinjoro urbestro, ĉar kiam li ne estas ebria, li ne plu volas edziĝi.“

de Prof. H. BOUCON.

KRONIKO

Bulgario

Plovdivo. — Antaŭ unu jaro fondiĝis ruĝa esp. grupo, kies titolo estas «*Devjatnin*». Nun ĝi enkalkulas 50 m. Vigla propagando ĉe komunistaj Partio kaj inter la junuloj. Ĉiuj K^{doj} estas petataj donace sendi esp. malnovajn libretojn kaj gazetojn por starigo de biblioteko. Ĉion oni sendu al K^{do} I. Ĉolakov (por grupo Devjatnin) Str. «*Kapitan Rajĉo*» n^o 66 *Plovdivo* (Bulgario),

Francio

Paris. — Okaze de la kelktaga ĉeesto en nia urbo, de nia kunlaboranto L. Révo, *Sennacieca Revuo* organizis publikan kunvenon, kiu estis plensukcesa. Elokvente parolis nia K^{do} pri: *Politika kaj ekonomia situacio en Germanio* kaj pri la *Komunista kongreso en Marseille*, kiun li ĉeestis. Kelkaj personoj kiuj ne komprenis esp.on povis tamen konvinkiĝi pri la valoro de nia lingvo kiel oratora esprimo.

Germanio

Leipzig. — Por pruvi la utilon de esp.o al la fakanaro kaj por interrilati pli efike kun la tipografistaro tutmonda, jena grupo estas fondita: *Tipografista Esperanta Grupo, Leipzig*; „*Volkshaus*“ *Zeitzer Str. 32. (Germ.)*. Eksterlandaj propagandaj kaj ekspoziciaĵoj ĉiaspecaj estas tre dezirataj. Oni sendos similaĵojn.

Litovio

Jonavo. — Antaŭ du monatoj mi malfermis en nia urbeto du esp. kursojn, kun partoprenas po dudek gejunuloj. Ni aranĝis ekspozicion tre sukcesplenan: Ĝi havigis al ni 2.000 Mk. kiujn ni utiligis por helpceloj al malriĉuloj k. t. p.

Ni tre dezirus aboni vian gazeton, sed ni timas pro la litova registaro, kiu persekutas kruele rev. socialistojn. Ni esperas ke venos pli favoraj cirkonstancoj — Ch. Fajn, ponava Kaŭno apsk. Senojn, g. ve n^o 7. *Litovio*.

Rusio

Astrahanj. — Esp. movadon subtenas la loka Sovjeto. Dum 1921 estis aranĝitaj 5 vesper.spektakloj kun esp.ta programo. Antaŭ nelonge estis finitaj 2 kursoj kun ekzamenoj kaj premioj. Nun funkcias 2 kursoj unuagradaj kaj 1 por praktikado de la lingvo. Estas starigataj diversaj fakoj: kluba, teatra, literatura, biblioteka, agitanta kaj informanta. La movado disvastiĝas en la tuta distrikto. Kursoj funkcias en jenaj vilaĝoj: *Zajaĉijostrov, Zelenga, Ĉagan, Nikolaebskajasloboda* kaj *Petropavlovka*. Ĉiujn korespondadojn oni sendu al la Informestro: *A. Kostanov, Astrahanj, Katoliĉeskaja 5*.


Preseraroj

Kelkaj el la lasta n^o devas esti menciataj. Unue troviĝas *sub la titolo*, dekstre, du vortoj forigendaj: „same dirite“. *Paĝo 7*, komence de la artikolo oni legu: *nuna* anstataŭ „unua“. — *Paĝo 10*, dua linio, de sub la portreto: *spirite* anstataŭ „spiritaj“. — *Paĝo 16*, lasta linio de la dekstra kolono: *redaktoro* anstataŭ „redakton“. — *Paĝo 17*, dekstra kolono, 7^a linio de supre: *onia* anstataŭ „oni“. Troviĝas ankaŭ kelkaj aliaj, kiujn certe niaj legantoj mem rimarkis kaj korektis en sia penso. — Red.

Noto:

Pro la ĝenerala striko de la fervojistoj en Germanio prokrastiĝis la apero de ĉi tiu numero.

Richter, Lerchner.



RECENZEJO

Libroj

Dictionnaire Complet Esp.-Français de E. Grosjean-Maupin
Eldonis *Esperantista Centra Librejo*, 51, rue de Clichy Paris (9^e)
Formato: 10 × 16 cm. 262 pĝ. Prezo: bindita 6 Fr. fr.

Ĝi estas dua eldono, revizita kaj korektita. Ne nur la aŭtoro korektis, sed li forigis multe da vortoj. Li tamen konservis la neoficialajn sufiksojn -oz, -iv, -iz kaj la prefikson mis- dum li forstrekis -end, kiu estas multe pli ofte uzata en la nunaperantaj gazetoj ol la tri cititaj sufiksoj. En la ekzemploj donitaj pri mis- li citas "misalianco" malgraŭ ke la vorto alianco ne plu troviĝas en ĉi tiu eldono.

Multaj aliaj mallogikajoj estus montreblaj. Sed mi preferas diri, ke tiu vortaro estas la plej rekomendinda el ĉiuj vortaroj por franclingvaj esperantistoj. Ĝi estas havebla ĉe la librejo de S. R. 177, rue de Bagnolet, Paris (XX).

Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio. — Raporto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongreso al la dektria Kongreso de Esperanto. — Raporto pri Internacia Organizo de Esperantistoj prezentota al la XIII-a Kongreso de Esperanto.

Tiuj dokumentoj ne estas recenzeblaj; oni legu ilin. Ti-kiuj interesiĝas pri tiuj temoj devas sin turni al: *Esperantista Centra Oficejo*, 51, rue de Clichy Paris (9^e), kie la broŝuroj estas haveblaj.

Unuigitaj Ŝtatoj de Brazilio. *Nacia Ekspozicio memoriga pri la 1a Centjaro de l'Sendependeco*. Eldonis *Brazila Ligo Esperantista*, Rio de Janeiro (Brazilio). Dekses paĝa riĉe ilustrita prospekto presita sur luksa papero. Oni petu ĝin al la supra adreso.

La Pesto en Milano dum 1630. El "La Gefianĉoj" de A. Manzoni tradukitaj de D^{ro} P. C. Monti. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italio) 1921. Formato: 17 × 24 cm. 22 pĝ. Prezo: 2 L.

Gvidlibreto de Antverpeno. Eldonita de S^{ro} Frans Schöofs, 45 Kleine Beerstraat, Antverpeno (Belgio) Tridekdupaĝa broŝuro ricevebla intersange de simpla responddoŝkarto sendota al la supra adreso.

Gvidlibro de Girona. Eldonis "Ĝirona Espero" (1921). Formato: 12 × 21 cm. 18 pĝ. Prezo nemontrita.

Ferdinando VI kaj Farinelli de J. M. Rosenörn. Eldonis la aŭtoro. Adreso: San Lucas 5, Madrid (Hispanio).- Formato: 11 × 15 cm. 46 pĝ. Prezo nemontrita.

Postrikolto de Antoni Grabowski (1921). Formato: 11 × 15 cm. 24 pĝ. — Ŝipopereo de Rafael de San Milan. Formato: 11 × 15 cm. 16 pĝ. Eldonisto S^o J. M. Rosenörn. Adreso, vidu supre.

Leipziga Foiro (1922). Deksespaĝa prospekto ilustrita, mendebla ĉe: Meßamt für die Mustermessen in Leipzig, Esp.-Fako, Markt 4.

Kiam estos pruvite, ke la vortaro-esperanto sufiĉas por kontentige kaj ekzakte, kaj ne nur proksimume, traduki la grandajn verkojn el ĉiuj epokoj kaj el ĉiuj landoj, tiam, sed nur tiam, ni rajtos malpermesi la uzadon de neologismoj al tiuj, kiuj verkas aŭ kredas verki literaturajojn.

E. GROSJEAN-MAUPIN.

L'Esperanto et la Lutte des Langues de Léon Agourtine. Eldonis *Office Esperantiste*, 51, rue de Clichy. Paris. Formato: 13 × 27 cm. 8 pĝ. Prezo: fr. 0.50.

Tiu propagandcela broŝuro en franca lingvo entenas argumentojn valoraj nur por naciemaj francoj.

Elektitaj versaĵoj. Tradukis el la rusa N. V. Nekrasov. Eldonis *Ĥersona Esp. Societo* (1921). Formato: 12 × 18 cm. 8 pĝ. Prezo nemontrita.

Esperanta Krestomatio el verkoj de diversnaciaj aŭtoroj. Kolektita de M. S. Valentinov. Eldonita de *Ĥersona Esp. Societo*. Formato: 12 × 18 cm. 32 pĝ. Prezo nemontrita. Deponejo: Moskvo, Ĉudovskoj per., n^o 6 (Rusio).

Gazetoj

Sub la Ruĝan Standardon! (n^o 1.) Okpaĝa gazeto redaktata tute en esp.-o. Formato: 18 × 22 cm. Prezo: 2000 rubl. Eksterlandaj abonantoj povas sendi enlandan papermonon en rekomendita letero (prezonedifinita). Adreso: Kronstadt (Rusio) poŝtkesto 918. — Enhavo: *Kvar jaroj; Internacia Kongreso de S.A.T.; Oktobra revolucio en Rusio estas signalo por detruo de kapitalista mondo* (bildo) *Laborista Solidareco de Jar Petr; Letero el Blanka Francio* de E. Adam; *El kapitalistaj landoj* (leteretoj el Portugalio kaj Bulgario) *Proletariaj kantoj* de V. N. Devjatnin; Hugo Vilaĥ, tre interesa artikolo nekrologia pri tiu, de la blankuloj mortigita, samideano. El tiu artikolo ni eltiru la jenon: "Dum la pendigo ŝirigis la maŝo per kiu li jam ekpendis (pro tro multaj pendigadoj) Rimarkinte tion la pendigist-oficiro, alpaŝinte al li diris: "Dio mem senkulpigis vin; vi devas nur malconfesi la nomon komunisto kaj tuj vi liberiĝos." Plene je komunista indigno li rigardis malestimege la ekzekutestron, kiu ankoraŭ volis kun sia malnobla propono hontigi la komunistan nomon; li mem prenis la ŝnuron, denove ĉirkaŭis sian kolon per la maŝo kaj diris: "Malbenon al premuloj kaj honoron al sinferuloj!..."

Novaj tempoj (n^o 1) Kvarpaĝa, hektografita gazeto redaktata tute en esp.-o. Formato: 22 × 32 cm. Eldonata de E. Vittecoq Sassetot-Bacqueville (Seine-Inf.) Francio. Oni mendu provnumeron. En ĉi n^o ni legas strangajon: "Ni komprenas ke aliaj gazetoj — eĉ simpatiaj kaj simpatiantaj kiel "Sennacieca Revuo" — ne povas pritrakti profesiajn kaj teknikajn aferojn." Nu, tion ni ne komprenas; kaj ni demandas tre amike al k^{do} E. Vittecoq ĉu li, aŭ iu alia instruisto, provis aperigi artikolojn pri profesiaj temoj en "S.R."? Ĝis nun neniam ni sukcesis havigi al ni tiajn artikolojn. Ni tre volonte tamen dediĉus du aŭ tri paĝojn al pritraktado de tiaj temoj. Sed, sed... ni deziras grandan sukceson al la sinoferema entrepreno de mia k^{do} E. Vittecoq..

Ruĝa Esperantisto (n^o 1) Rusio, N. Novgorod, Studjonaja 53. En rusa kaj esp.-a lingvoj. Formato: 17 × 27 cm. 12 pĝ.

Internacia Pedagogia Revuo. *Oficiala organo de Internacia Asocio de Instruistoj* (n^o 1—2). Okpaĝa revueto tute en esp.-o. Eldonanto: S^{ro} Jan Jacobs, Boomsche Steenweg 444, Antverpeno (Belgio).

Egipta Esperantisto (n^o 1). Red. kaj Adm.: 4 Farahdeh str. Aleksandrio. En franca itala kaj esp.-a lingvoj. Formato: 17 × 24 cm. 12 pĝ.

Der Arbeiter-Esperantist (januaro). Red.: Paul Rauchenbach, Göppersdorf b. Burgstädt i. Sa.

Prepare al la *Asocitago* de G. L. E. A. oni komencas vige diskuti en nia kunfrata organo pri internacia organizajo. Eble estus bone, ke ĉiuj "gleanoj" konu tute ĝuste la celon de S. A. T. Kial "D. A. E." ne publikigis la Prahon Rezolucion al ĝi senditan? Peĉo el la Statuto ankaŭ helpus komprenigi la aferon al niaj germanaj kamaradoj. Nenio estas pli bedaŭrinda ol mistrafa argumentado.

Memornoto: — 1) *Gazetoj tute en esp.:* Ĉeĥoslovaka Gazeto (6), Espero Katolika (124), Esperanto (12), Esperanta Finnlando (12), Esperanto Triumfonta (63, 64, 65, 66, 67), Esperanta Junularo (5), Kristana Espero (6), Kataluna Esp.isto (11—12), La Progreso (10) La Esp.isto (24—25), Literaturo (12), Hungara Esp.isto (12), Libero (13), La Unuigita Tuthomaro (Nov.-Dec.), Verda Utopio (Nov.).


2) *Esp. Gazetoj dulingvaj:* Amerika Esp.isto (1, 2), Arguso (3—4), Bizancio (5), Agitanto (8), Bulgara Esp.isto (4), Germ. Esp.isto (12), Esp. o-Praktiko (12), La Interŝanĝo (11, 11 bis) Internacia Komerca Revuo (22), The-British-Esperantist (202), La Verda Ombro (10, 11), La Revuo Orienta (11), La Marto (12), L'Esperanto (11, 12), La Espero (11—12).

3) *Enhavantaj esp. artikolojn:* Le Sincérisme (10, 1), Le Chrétien Libre (136), Bokbinder Tidende (18), Sonne der Wahrheit (1), Freytum (Nov.-Dec.).

4) *Enhavantaj priesperantaj artikolojn aŭ tradukaĵojn el S.R.:* Ny Tid (180), Nova Sociedade (1, 2), Le Néo-Naturien (1), L'Ecole Emancipée (16), Eugenia (8—10), El Heraldo Naturista (2), Alba Roja (2), Świat Pracy (1), Mitteilungs-Blatt (50), Le Syndicaliste des P. T. T. (113), Infinito (24), Neue Zeitung (163), Norra Smaland (39), Neue Lodzer Zeitung (223, 337, 7), De Arbeid (51).

5) *Idistaj aŭ mondlingvaj:* Suisan Idisto (1), L'Edukero (2, 3), Mondo (11, 12), Bulletin Francais-Ido (37, 38), Academia pro Interlingua (2, 3), Esperantida (4), La Feuille (1).

6) *Diversaj:* La Bataille (20, ĝis 27), La Paix par le Droit (10—11), L'Idée Libre (17), Les Humbles (11), L'Ordre Social (10), La Rose & Croix (12), Savoir (24), L'Ordre Naturel (54).



Sennacieca Asocio Tutmonda

23. Rue Boyer, Paris-XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo: Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

Jarkotizo: Laŭ valoro de unuhora salajro meza = Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cent., k. t. p.

Membreco kaj jarabono al «Sennacieca Revuo»: Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).

*

La 2a Kongreso de S.A.T. — Fine ni ĵus ricevis firman inviton. La S.A.T.-anoj de Frankfurt a. Main (Germ.) sin proponas por organizi la Kongreson; ĝi okazus dum aŭgusto 1922, samtempe kun la Internacia Sindikata Kongreso de la Ministoj. Ties daton precize ni ne scias ankoraŭ, tamen la Iniciatora Komitato aplaudis ambaŭmane tiun inviton. Ja, geografie Frankfurt estas taŭge lokita, ankaŭ ekonomie, . . . kaj la samtempeco de la Minista Kongreso garantias trafan propagandon.

En proksima N^o ni publikigos detalojn. Dume, la provizora Sekretario de la Kongresa Komitato estas: *Kdo. Jean Roth*, Rodelheimer Landstraße 131, III, Frankfurt a. Main (Germ.).

*

Nur ses monatoj pasos ĝis nia Kongreso. Ses monatoj estas tempospaco sufiĉe longa, se ni scios ĝin uzi metode. Tuj ni eklaboru. Jam nun ni ekpreparu la farotajn. Ni interrilatigu. Ni komuniku niajn ideojn, niajn projektojn al Iniciatora Komitato, kiu ilin publikigos en SENNACIECA REVUO. Ni ne perdu nian tempon en aranĝo de festoj, festenoj baloj, teatraĵoj k. t. p. Kiuj ŝatas danci, ekskursi, kiuj deziras aŭskulti la belajn promesojn de kelkaj moŝtuloj, ministroj, reprezentantoj de la ekspluatanta klaso, tiuj vojaĝu ien Finnlandon. Sed, tiuj venos Frankfurton kiuj volas labori. Nek 2000, nek 1000, eble nek 500 nombros la partoprenantoj de nia Kongreso, tamen certe ĉi faros al la Tutmonda Proletariaro pli ol ĉiuj pasintaj Kongresoj esperantistaj, kaj nur la intereso de nia Klaso devas gvidi niajn penojn.

Jam nia la trumpetis en Esperantio al kuniĝo de la proletariaj elementoj. Nia 2a markos la komencon de nova epoko en la uzado de la lingvo: ĝi estos plia revoluciigilo en la manoj de la ekspluatata Klaso.

*

Ke la S.A.T.-anoj estas malriĉaj, kaj ke por multaj la kosto de la vojaĝo al Frankfurt estos ekstere de ilia povo, tion ni scias. Tiurilate ni memoras pri la ideo de niaj Kdoj. de KRISTIANA, kiuj jam de longe kolektas monon por pagi la elspezojn de sia delegito. Tre rekomendinda estas tiu rimedo. Ĉiu Kdo. allasu ĉiusemajne, ĉiunonate kelke da moneroj al la Sekretario de sia grupo, kaj tiel rapide estos kovrata la monsumo bezonata.

*

La 15an de februaro estos la ekstrema datlimo ĝis kiam ni akceptos presendaĵojn en nian jarlibron. La oficiala adresaro entenos la adresojn de ĉiuj S.A.T.-anoj pagintaj la 1921-jaran kotizon, sed kompreneble ĝin ricevos nur ti-kiuj estos pagintaj la 1922-jaran kotizon.

*

Ni plezure anoncas la baldaŭan aperon de la volumo 2^a de nia Biblioteko. Ĝi estos kelkpaĝa broŝureto en kiu estas pritraktata la problemo pri organizado, kiun tro multaj miskomprenas aŭ ankoraŭ ne klare komprenas. Tiu broŝuro estos dissendota plej multe: ĝia prezo estos tre malkara. Detalojn en proksima No.

*

Konsidere la nunan ekonomian situacion de RUSIO, la Iniciatora Komitato decidis (en sia kunveno, 10 januaro) akcepti senpage ĉiujn aniĝojn de Rusio. Ni substrekas ke tiu decido estas nur provizora; cetere, ni fidas al niaj Kamaradoj rusiaj, kaj ni ne dubas ke ili konsideros kiel sian devon pagi tuj kiam la cirkonstancoj permesos.

*

Unu konsileton al la aniĝontoj: skribu vian adreson laŭ la jena ordo: 1) familia nomo, 2) nometo, 3) profesio, 4) strato kaj N^o, 5) urbo, 6) lando. Ĉiam skribu legeble.

Kdo STIERLUND A. John, alitempe: poste restante en HAPARANTA (Svedio) estas petata doni sian novan adreson.

15 januaro 1922

La ĝenerala Sekretario de S.A.T.



KORESPONDADO

TARIFO: Unu enpresoj, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr.
Dek-du enpresoj, 6 fr.

MALLONGIGOJ: L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkarto ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj. Esp-ajo = Esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribiĝis.

Argentino

K^{do} A. Barrot, Congreso 5155, Buenos Aires, kun kamar. ĉ. l.

Bulgario

K^{do} Teodosij Ĉolakov, Str. "Kapitan Rajčo" N^o 66, Plovdiv. L. pri komunista jun. movado k. ĉ. l.

K^{do} Vasil Atanasov, Str. "Car Ŝiŝman" N^o 26, Plovdiv. L. pri Komunismo kaj sporto.

Germanio

K^{do} Arthur Busch, Natherstr. 5, Dresden-A. 26, kun alilandaj kamar., let. pk.

K^{do} Alfred Hartung, Ooppelstr. 40, Dresden-N. 12.

K^{do} Christian Schmid, Schranerstr. 5, Ingolstadt.

K^{do} Johann Schwaiger, Kavalier Hejdek, Ingolstadt.

K^{do} M. Becker, Rathausstr. 19, l., Leipzig-R., kun Paris'ano kaj London'ano pri komercaj aferoj; interŝanĝas naciajn gazetojn.

K^{do} H. Manske, Breite Str. 4, Berlin-Schmargendorf, peras por gekursado, kiuj deziras korespondadi. L, Pl. Tuj respondos.

K^{do} Von der Heid, Charlottenstr. 11, Leipzig-R., petas al tipografistoj, ke ili sendu ĉiaspecajn presaĵojn el ĉiuj lingvoj, por represo kiel modelojn en fakjournalon por esperanta propagandnumero.

H^{do} G. Baumann, Cunostrasse 64, Berlin-Gr., k. ĉ. l., PM., Pl., L, ĉiam respondas.

K^{do} Otto Schill, Südstr. 10, Leipzig.

K^{do} Oskar Werkmeister, Hermannstr. 23, Leipzig-Co., k. ĉ. l., L, Pl.

Hungario

K^{ino} Margareto Drexler, VI. Csengery str. 63^a, Budapest, Pl, bfl, interŝanĝas ŝtatmonojn; certe respondos.

K^{do} Stefanv Géri, V. Visegrádi str. 24, 1/20, Budapest, kun ĉ. l. gekamar., Pl.

Polio

K^{do} Kazimierz Domoslawski, Warsowio I, postrestante. Kunlaboranto de soc. gazetoj, serĉas seriozajn korespondantojn en ĉiuj landoj pri socialista, laborista movadoj, kaj pri politika kaj socia vivo, sendus samajn sciigojn el Polio.

Rusio

K^{do} A. Kostanov, Katoliĉeskaja 5, Astrahanj, petas korespondantojn por li kaj 5 el siaj samurbanoj. Pri ĉiuj temoj, L, PK, k. ĉ. l.

K^{do} Lazaro Abramoviĉ, Ĥarjovskaja n^o 65, Bahmut, L, PK, k. ĉ. l.

K^{do} M. P. Bokarov, p. o. Karakim, orlov gub. L, pri ĉiuj temoj.

K^{do} Vjaĉeslov Vasljekiĉ Ĥalaŝimikov, Nijnij-Novgorod, Gruzinskij per. 6 kv. 6.

V. V. Varankin, Nijnij-Novgorod, Stadensja 53.

K^{do} Ivanov Voznesensk, gub. Konstantinova al J. Jolev, L, PK, k. ĉ. l.

K^{do} Aleksandr Koĉkin (14-jara) gubernio Viatka, urbo Urĵum, Revolucionnaja str. n^o 4. L. pri disvastigo de esp o kaj pri naciaj moroj kaj vivmanieroj.

LETERKESTO

J. Burger (Essen, Germ.). Via "himno pri internacia barbarismo" estas presinda. Sed mi ne povas liveri vian manuskripton al la presisto, tial ke vi skribis ambaŭflanke de la folioj: jam plurfoje mi metis atentigajn notojn pri tio en la gazeton. Tempon mi ne havas por rekopii manuskriptojn! — Fratecan saluton. —

E. Lanty

K^{do} Abravanel el Salonique. — Mi ricevis vian leteron; sendu la abonprezon per registrita letero. El ĉiuj landoj oni sendas sammaniere — Kamarade, L. Glodeau.

Ĉiu esperantisto devas legi, relegi kaj meditadi

la unuan volumon de nia literaturo:

Tri Verkoj de Tolstoj

El rusa lingvo tradukis J. M.

(Korektita kaj aprobita de Literatura Esperantista Asocio)

Kun portreto de la aŭtoro
kaj antaŭparolo de ROMAIN ROLLAND

82 paĝoj.

PREZO AFRANĜE: 1,50 franca franko por landoj kurzsufertantaj rilate al franca franko. Por anoj de S. A. T. nur 1,10 fr. fr.

3 francaj frankoj por Francio kaj ceteraj landoj — Por anoj de S. A. T. 2,25 fr. fr.

(Pagebla prefero per monbiletoj aŭ bankĉekoj.)
Havebla ĉe S. A. T., 23, rue Boyer, PARIS (XX^e)

L' Esperanto

Internacia Monata Revuo

Sub patronado de la Itala Katedro de Esperanto

Direkcio de la Revuo: S. Vito al Tagliamento (Italia)

Abonoj por 1922: Italo: Liroj 10
Eksterlando: dufoje

la kosto por afranko de ordinara letero al Eksterlando laŭ nacia tarifo. — Aparta n^o: la dekonon de la supredirita kosto

Abonu tuj